der esperantist

Mitteilungsblatt der Esperantofreunde im Kulturbund der DDR

18. Jahrgang | Nr. 116 (6/1982) | ISSN 001 4-0619 | 30 Pf

Esti maltrankvila ne sufiĉas, necesas la pacago!

Milionoj vokas sur placoj kaj stratoj, el urboj kaj vilaĝoj. Nia planedo ne pereu! La homaro ne forbruliĝu en fajra morto. Homoj de ĉi-tiu tero estas plenaj da maltrankvilo pri pacama estonteco, sed ankaŭ kunligas ilin la firma volo al komuna rezisto kontraŭ la milito.

La homoj estas maltrankvilegaj vidalvide al la daŭranta armado kaj superarmado de NATO, al ties raketaj planoj de Bruselo kaj per tio al la preparo de atommilito. Sed Eŭropo neniam fariĝu Eŭroŝimo! Oni devas bridi la agresanto en la Proksima Oriento, en Suda Afriko, en Meza Ameriko kaj en la Kariba Maro. La rezisto kontraŭ tiu minaco ne estas utopio. La fortoj de la mondvasta pacmovado neniam estis tiel grandaj kiel hodiaŭ. Kaj apartenas al ĝi senrompeble la landoj de l'socialismo, kie neniu tiros profiton el armado kaj militpreparo.

Ĉiuj pacfortoj de la tero sciu: Ekzistas elirvojo el tiu ĉi situacio. Ĝin montras Soveta Unio kun siaj proponoj pri traktadoj kaj sia senprecedenca sindevigo, rezigni je ekuzo de atomarmiloj kiel unua. Tiun paciniciaton plenkore subtenas ŝtato kaj popolo de Germana Demokratia Respubliko.

Ĉiuj pacfortoj de la tero ekkonu: Tie — kie regas la socialismo kaj ĝia vivintereso je paco, tie regas politiko de pripensemo kaj traktemo. Sed de tie, kie determinas la politikon la strebo al milita supereco kaj al mondregado, de tie venas la ne!

Ĉiuj pacfortoj de la tero deziras traktadojn kun veraj rezultoj de malarmado, sur la vojo al daŭra paco. Demagogio ne trompos ilin. En nia Germana Demokratia Respubliko pacpolitiko de la ŝtato kaj la pacstrebado de la popolo estas identaj. Pro tio milionoj sindediĉe kaj forte laboras por la sekura prospero de nia socialisma patrio. Pli ol iam antaŭe validas, ke plifortiĝas la paco per nia agado. Ĉiun tagon estu ago por la paco.

Desur la tero de Germana Demokratia Respubliko post la detruo de la faŝismo eksonis la sankta ĵuro: Neniam denove desur germana tero komenciĝu milito kaj minaco kontraŭ aliaj popoloj.

Detlev Blanke

Bulgara-germana amikeco pere de Esperanto

„Pri la ligoj inter bulgaraj kaj germanaj laboristaj esperantistoj dum la 20-aj kaj 30-aj jaroj kaj la kunlaboro inter BEA kaj la esperantistoj de GDR“

Prelego resume prezentita en la kadro de la science-praktika konferenco „75 jaroj Bulgara Esperanto-Asocio“, 25. 9. 1982 en Veliko Tirnovo.

Antaŭrimarko:

Pri la ligoj inter bulgaraj kaj germanaj laboristaj esperantistoj ankoraŭ ne ekzistas superrigarda studo. Pro tio la aŭtoro aparte emfazas tiun parton de la temo, des pli, ĉar la faktoj pri la bona kunlaboro en la nuntempo inter BEA kaj GDREA ĝenerale estas iom pli konataj ol la forpasinta historio.

I

Jam ekde 1888 kaj en Germanio kaj en Bulgario troviĝis adeptoj, kiuj propagandis Esperanton kaj kreis bazon por ties disvastigo. En Bulgario tiuj i. a. estis Miloslav Bogdanov, Hristo Popov kaj Georgi Oreŝkov. En Germanio aparte menciindas Leopold Einstein, Wilhelm Heinrich Trompeter kaj Ludwig Emil Meier. Tamen pasis preskaŭ du jardekoj ĝis la fondo de landaj Esperanto-asocioj. En 1907 formiĝis en Tirnovo la fundamento de Bulgara Esperantista Ligo, antaŭulo de Bulgara Esperanto-Asocio kaj en Germanio 1906 fondiĝis en Braunschweig Germanlingva Esperantista Societo kiu ŝanĝiĝis 1909 en Germana Esperanto-Asocio. Tiel kreiĝis la unuaj organizaj kadroj por germanaj-bulgaraj kontaktoj pere de Esperanto.

Tamen — la plej multaj germanaj bulgaraj kontaktoj por ni hodiaŭ aparte interesaj realiĝis en la kadro de la proleta movado. Jam la jaroj antaŭ la unua mondmilito progresemaj laboristaj rondoj, aparte socialdemokratoj, ekuzadis Esperanton por siaj klasaj celoj kaj fondis 1908—1910 la unuajn grupojn en Breslau, Chemnitz (la hodiaŭa Karl-Marx-Stadt), Hamburg, München, Nürnberg k. a. En 1911 kreiĝis la Germana Laborista Esperantista Asocio (GLEA), kiu tamen plenforte eklaboris nur post la unua mondmilito. Se dum la dudekaj jaroj en Germanio, almenaŭ ĝis 1933, ekzistis certagrade favoraj politikaj kondiĉoj por ekfloro de forta laborista Esperanto-movado — post la sovetunia la plej forta en la mondo — en Bulgario la monarkofaŝisma ŝtatrenverso jam ekde 1923 tre limigis similan evoluon. Tamen la Bulgara Komunista Partio kaj aliaj klaskonsciaj fortoj tre bone komprenis la valoron de Esperanto por la starigo de senperaj ligoj al la unua socialisma ŝtato de la mondo — Sovetunio — kaj al aliaj proletoj. Multaj komunistoj eklernis la lingvon. La ekapero de „Balkana Laboristo“ en la jaro 1929 sub la redakto de Simeon

---

Gvidita de ĉi-tiu sindevigo ni — reprezentantoj de la granda kaj unueca pacmovado de Germana Demokratia Respubliko — deklaras nian volon, kiel pasintece tiel ankaŭ estonte plifortigi la mondan movadon por paco kaj malarmado.

(El „Informationen“ de Packonsilantaro de GDR, 5/82)

Petrov, Nikola Aleksiev kaj Atanas Lakov estis grava signalo por tio. La akriĝo de la klasbatalo en Bulgario ne lasis netuŝita la neŭtralan movadon. Kreskis la neceso krei apartan laboristan organizaĵon, kiu fondiĝis 1930 kiel Bulgara Laborista Esperantista Asocio (BulEA) kun sia organo „Meždunaroden Ezik". Jen ekaperis la frata organizaĵo de GLEA, kiu tre faciligis la ekeston de rektaj kaj fortikaj ligoj inter bulgaraj kaj germanaj proletoj — esperantistoj. Aparte interesaj tiuj kontaktoj estis inter la jaroj 1929—1933, sed ne ĉesis post la venko de la hitlera faŝismo en Germanio kaj de la malkaŝa faŝisma diktaturo 1934 en Bulgario.

Trafoliumante la organon de GLEA „Germana Laborista Esperantisto" oni ne malofte trovas informojn pri la bulgara laborista Esperanto-movado kaj ties eldonaĵoj.

En n-ro 7/1931 (p. 7) oni ekzemple recenzas la novelaron „La Himno" de M. Ljubin (= Asen Grigorov), kiun 1931 eldonis la soveta-germana Eldon-Kooperativo por Revolucia Esperanto-Literaturo (Leipzig). Ĝin oni taksas „luma strio, lumanta la internan grandecon kaj oferpretecon de la luktanta proletaro". Tiu verko el la „blankterora Bulgario" laŭ la recenzanto distingiĝas per „kaptanta rego de la lingvo". Kaj en n-ro 10/1932 (p. 2) oni represis la rakonton „Bubo" el la menciita kolekto.

En n-ro 12/1931 la revuo laŭdas la „majstran tradukon" de SA-MA (= Sasonov + Gorov) de la fama „Septembro" de Geo Milev. Kaj en n-ro 5/1932 aperis rakonto de Velko „En karcero bulgara", kiu tre vive priskribas la unuamajan feston en prizono.

La reakcia polico en Bulgario kompreneble malame rigardis la disfloran-tan aktivecon de BulEA kaj entreprenis diversajn paŝojn por malhelpi. 1931 ĝi arestis la redaktoron de „Balkana Laboristo" Simeon Petrov. Pri tio informas kun foto „Germana Laborista Esperantisto" en numero 12/1931 (p. 3). Kaj en „Weltkontakt" (Monda Kontakto), aŭtuno 1932, propaganda suplementa aldonaĵo al Germana Laborista Esperantisto (p. 3) ni trovas fotojn el „Meždunaroden Ezik" (la iama Balkana Laboristo) pri la arestigo de ties redaktoro. Ĉe la menciita eldonejo EKRELO krom la menciitaj ankaŭ aperis jenaj titoloj de bulgaroj:

- H. M. Ĥrima (Gorov): Ĉe abismo (1932)
- T. Pavlov: La animo de la „barbaroj" (1932)
- M. Ljubin (A. Grigorov): Ruĝa aŭroro.

Ili trovis varman akcepton ĉe la germanaj laboristaj esperantistoj. La plej gravan rolon en la peresperantaj laboristaj kontaktoj sendube ludis la korespondado, kiu estis tre firme ligita kun material- kaj informinter-ŝanĝo rilate al la politika situacio en la koncernaj landoj. Tre grava motivo por lerni Esperanton por multaj laboristoj estis la volo ligi rektajn kontaktojn al Sovetunio, kiu disponis pri bone floranta dinamisma movado.

Tiel ankaŭ la fama bulgara esperantisto Trifon Ĥristovski, kies biografio „Mia vivo" en la traduko de Nikola Aleksiev aperis 1981 en Sofio, publikigis 1929 sian adreson kaj ricevis 70 korespondproponojn. Rezulte de tio li ligis perleterajn kontaktojn al esperantistoj en Germanio, USSR kaj aliaj landoj.

Bone konataj estas la firmaj kaj jardekojn daŭraj ligoj inter la konata germana komunisto Otto Bässler el Leipzig kaj Ljubomir Ognjanov-Risor, kiu post la milito fariĝis konata literatur-sciencisto. Ognjanov, siatempe ankoraŭ lernanto, skribis al Bässler, kiu 1928 gvidis la gazetaran servon

de SAT, kiu 1930 transformiĝis en Proleta Esperanto-Korespondado (PEK), grava instrumento de la opozicia grupo en SAT. Ognjanov ne bone sciis pri la politika profilo de Bässler, sed trankviliĝis, kiam tiu certigis lin, ke la materialo staras „plene sur la katolikaj pozicioj" kaj ke la gazetara bulteno „mem estus plene „katolika".[1]) Nu — „katolika" signifis „komunista". Ekde 1928 ĝis fino de 1932 Ognjanov regule sendis al Bässler, preskaŭ ĉiusemajne, artikolojn pri la klasbatalo en Bulgario kaj subskribis per la pseŭdonimo GOL. La gazetara kaj posta PEK-bulteno estis produktita de Bässler kaj dissendita en multajn landojn. Tie proletaj esperantistaj korespondantoj nacilingvigis la ricevitan materialon kaj publikigis ĝin en la maldekstra nacia gazetaro. Materialo ricevita pere de la PEK-bultenoj el USSR kaj el aliaj landoj aperis en la bulgara traduko en la organo por laborista-kamparana korespondado „Meždunaroden rabselkor", kin 1933 anstataŭis „Meždunaroden Ezik". Tiu gazeto atingis en 1934 eldonkvanton de 7 000 ekzempleroj[3]).

Krom la laboro pri kaj pere de la bultenoj Bässler ankaŭ funkciis kiel peranto inter GOL kaj Sovetunio. Ricevo de letero el Sovetunio por bulgaro signifis grandan danĝeron. Sed en kuverto kun germana poŝtstampo la polico ne supozis sovetan materialon. Multaj leteroj de GOL iris al la konata soveta esperantisto Isaak Krolik el Smolensk, kiu ankaŭ estis tre intima amiko de Otto Bässler.[2])

Granda estis la ĝojo post la fino de la dua mondmilito, kiam Krolik kaj Bässler persone konatiĝis kun sia korespondanto. Ankaŭ ekzistis provoj pri solidareco de germanaj laboristaj esperantistoj helpe al persekutataj pere de la reakciularo bulgaroj. Alfred Kraushaar el Berlin 1929 elektiĝis vicprezidanto de GLEA kaj ankoraŭ bone memoras, kiam li fine de la 20-aj jaroj donis restadeblecojn en sia hejmo al presisto el Sofia kaj studento el Plovdiv. Ili gastis ĉe li ĉirkaŭ 3 semajnojn. Ankaŭ en la 1932a en Berlin fondita Internacio de Proleta Esperantistaro (IPE)[4]) bulgaraj kaj germanaj laboristaj esperantistoj agis kune.

Kiam la faŝismo komence de 1933 venkis en Germanio, GLEA estis tuj frakasita kaj ankaŭ IPE, kies ĉefa sidejo estis en Berlin, suferis gravajn perdojn. Tamen, la germanaj laboristaj esperantistoj parte daŭrigis sian agadon kaŝe kaj sendis bultenojn pri la faŝisma teroro en Germanio eksterlanden.

En „Meždunaroden Rabselkor" tiamaniere aperis multaj materialoj. Ekz. en n-ro 7—8/1933 (p. 5) la PEK -servo el Chemnitz amplekse informas pri antifaŝismaj demonstracioj kaj en n-ro 9/1933 ni legas sur la unua paĝo grandan raporton titolitan „Situacio en Germanio" informojn pri la incendio de Reichstag (regna parlamentejo) kaj la arestigo de Marian van der Lubbe. Sur la sama paĝo krome aperis informo kaj protestletero pri la enprizonigo de Ludwig Renn (26. 3. 1933), kiu — siatempe aktiva esperantisto — estis la prezidanto de la Internacia Asocio de Revoluciaj Esperantistaj Verkistoj [IAREV][5]). Ampleksan raporton pri la faŝisma Germanio oni ankaŭ trovas en n-ro 16/1933 (pri la unua majo sub la faŝisma regado) kaj en multaj aliaj numeroj.

La korespondaj rilatoj kompreneble tre reduktiĝis, sed ne ĉiuj frakasiĝis. Tion i. a. pruvas leteroj de Carl Zeisig el Leipzig, kiu skribis sub la kaŝnomo Karl Becker leteron datitan la 4. 4. 1933 al Ĥristo Kanev en vilaĝo Loveĉ (strato Zagorsko), en kiu li informas, ke venkis Hitler. Interalie li skribis:

„Bildojn pri la malbona stato ĉi-tie mi ne povas sendi al vi, ĉar la komunista kaj socialdemokratia gazetaro estas malpermesita por ĉiam. Tagon

post tago okazas domtraserĉadoj ĉe funkciuloj kaj suspektindaj personoj. La faŝistoj kaj helppolicistoj aperas en amasoj ... Neniu povas diri sian opinion sur la strato, alie arestos nin la policistoj... La adreso sur la dorsflanko de la letero ne ĝustas, por ke la policistoj min ne povu aresti." Temas pri la konata nuntempa esperantisto Ĥristo Kanev el Sofio.

Ĥristo Kanev, tiam studento, hodiaŭ aktivulo de BEA, konservis kontakton al la juna 23jara studento L. Welward el Stuttgart, kiu ekzemple en letero de 26. 1. 1933 priskribas kiel la polico gardis naziajn demonstraciojn kaj mortigis komunistojn: „Hieraŭ demonstraciis en Berlin 130 000 k-doj kun la volo pri la mondrevolucio — sed samtempe okazis en Dresdeno fimurdo de la faŝtista polico — la polico mortpafis per kugloj en ŝlosita ĉambrego 9 k-dojn. K-do Kanev, organizu proteston je tiu fiago, sendu al mi protestleteron kaj mi tion peros al la distriktgvidantaro de la kompartio" kaj aliloke „Sendu al mi raportojn pri la bataloj de la laborantaro kaj studentaro en Bulgario, mi faros la saman. Aperigu mian raporton, disvastigu ĝin, kiel vian leteron mi jam aperigis. Sendu materialon, afiŝojn, broŝurojn kaj gazetojn, mi sendos ankaŭ". En letero de 14. 2. 1933 Welward priskribas radioparoladon de Hitler plenan da mensogaj promesoj al la germana popolo ...

Ke Esperanto ankaŭ ludis rolon eĉ sub la kondiĉoj de nazia koncentrejo oni legas en la bonega libro „Naŭ jaroj en la infero" de Naĉo Kemalov (Budapest 1980). En la koncentrejo Sachsenhausen (pri kiu, cetere, en GDR aperis esperantlingva prospekto) Naĉo Kemalov ekuzis Esperanton por kontaktoj al germanaj komunistoj, inter alie al la redaktoro de „Rote Fahne", Willy Gutdorf. Ankaŭ pere de Esperanto-letero, kiun sendis angla kamarado, liberigita el la koncentrejo, al Bulgario, la familio de Naĉo Kemalov eksciis pri lia sorto.

Sendube ankoraŭ ekzistas multaj interesaj kaj gravaj materialoj pri la ligoj inter bulgaraj kaj germanaj laboristaj esperantistoj. Estus inde, ilin sisteme kolekti kaj esplori.

Ĉiuj tiuj malmultaj donitaj ekzemploj, apartenas la stabila fundamento, sur kiu konstruiĝis post la dua mondmilito, post la venko de la socialismo en Bulgario kaj en unu parto de la iama Germanio, en Germana Demokratia Respubliko, la amikeco kaj kunlaboro inter Bulgara Esperantista-Asocio kaj la esperantistoj organizitaj en Kulturligo de GDR.

II

Kiam dum la 50aj kaj 60aj jaroj la Esperanto-movado en multaj socialismaj landoj denove reorganiziĝis, por la esperantistoj de GDR tre grava kaj instiga estis la impeta disvolviĝo de la movado en Bulgario. „Nuntempa Bulgario", la bulgaraj eldonoj de „Paco" kaj aliaj materialoj estis tre ŝatataj kaj vaste legataj. Apartan signifon havis la 48a Universala Kongreso de Esperanto 1963 en Sofio kaj la TEJO-Kongreso en Vraca. Ambaŭ kongresojn partoprenis centoj da esperantistoj el GDR, multaj kiel gejunuloj, hodiaŭ okupantaj gvidajn funkciojn en la iama Centra Laborrondo kaj 1981 fondita Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR. (GDREA) En la tempo de diplomatia izoliteco de GDR la esperantistoj el GDR ĉiam sentis la solidaran helpon de BEA, gviditan i. a. de N. Aleksiev, Ĥ. Gorov, St. Kostadinov, K. Valev, V. Oljanov kaj aliaj. La internacia aŭtoritato de Bulgara Esperantista Asocio kaj de ties funkciuloj ankaŭ helpis al la esperantistoj organizitaj en Kulturligo de GDR trovi sian vojon en la internacian movadon.

Ekde la apero de „der esperantist“ organo de GDREA, sur ties paĝoj oni regule trovas materialojn el la plumo de konataj bulgaraj esperantistoj. Tio estas pli ol 40 pli grandaj kontribuoj en la 112 numeroj ĝis mezo de 1982 aperintaj. Sur la paĝoj de la malgranda revuo oni omaĝis i. a. al la vivo de tiel elstaraj iamaj laboristaj esperantistoj kaj nuntempaj aktivuloj kiel N. Aleksiev, Ĥ. Gorov kaj A. Grigorov. Ŝatataj estas ankaŭ la fakaj kontribuoj de V. Oljanov kaj C. Murgin (GDR-Paco 1980, 1981, 1982). Multaj bulgaraj reprezentantoj vizitis centrajn kaj regionajn aranĝojn en GDR, inter ili la artistoj Maria Angelova, Belka Beleva kaj Anani Anev. Pro la grandaj meritoj en la kultura alproksimigo de la bulgara kaj germana popoloj, aparte sur la kampo de Esperanto kaj pro la elstaraj meritoj kiel prezidanto de MEM, Nikola Aleksiev estis distingita per la Johannes-R.-Becher-medalo en oro, la plej alta distingo de Kulturligo. Krome li — kaj ankaŭ Ĥ. Gorov — ricevis la honorinsignon de GDREA.

La abundaj turismaj aranĝoj, internaciaj kursoj kaj kulturaj aranĝoj organizitaj ĉiujare de BEA en GDR estas tre konataj kaj ŝatataj. Apartan puŝon antaŭen al la laboro de la esperantistoj en GDR sendube donis la 63a Universala Kongreso de UEA okazinta 1978 en Varna kaj la TEJO-Kongreso en Tirnovo, kiun partoprenis 140 esperantistoj el GDR, tiam jam reprezentantaj stabilan enlandan organizaĵon.

Apartan signifon GDREA atribuas al la evoluo de senperaj amikecaj ligoj inter la Esperanto-grupoj de ĝemelaj urboj el Bulgario kaj GDR. Tiaj rilatoj ekzistas i. a. inter Leipzig — Plovdiv, Karl-Marx-Stadt — Pazarĝik, Potsdam — Russe, Frankfurt/Oder — Vraca, Suhl — Smoljan, Magdeburg — Ŝumen.

Ĉi-rilate ankoraŭ multo estas farebla kaj „der esperantist“ volonte peradas adresojn de kluboj kaj korespondemaj bulgaroj. Sole en 1980 kaj 1981 la revueto aperigis 40 dezirojn.

Dum la lastaj jaroj ankaŭ plioftiĝas la fakaj kontaktoj inter la asocioj: i. a. inter la medicinistoj (grava sukceso estis IMEK 1981 en Russe), fervojistoj kaj interlingvistoj.

Gastprelegantoj aperis antaŭ grupoj en GDR, kaj reprezentantoj de GDREA prelegis en Bulgario.

Entute la rilatoj inter ambaŭ asocioj bone evoluas, portataj de fortikaj tradicioj kaj de komunaj idealoj.

Bulgara Esperantista-Asocio fariĝis 75jara. Bona jubileo. Ĝia estonto estu hela kaj sukcesa.

Notoj

1) Tiujn citojn kaj la pluajn indikojn komparu — Ognjanov-Risor, Ljubomir: Nemskijam rabotnik-pečatar Oto Besler — na 75 godini. En: Globuje. Specialno izdanie. junio 1972, Smoljan, p. 7
2) Krolik priskribas siajn memorojn pri Ognjanov en „Raboĉij put'“ (Smolensk), 8. 10. 1974. Komparu ankaŭ rakonton pri GOL de W. Kondakow en Komsomolskaja Pravda (Moskva), 24. 5. 1974
3) Kp. „Sur Posteno“, Moskva, 28/29 (164—165), 1934, p. 113
4) Kp. Blanke, D.: La Internacio de Proleta Esperantistaro (IPE). En: Blanke, D. (Red.): Socipolitikaj aspektoj de la Esperanto-Movado. Budapest (HEA), 1978, p. 50—62
5) Pri Ludwig Renn kaj lia rilato al Esperanto komparu: — Blanke, D.: Ludwig Renn — la esperantisto. En: GDR-Paco 1980, p. 23 — Rememoroj pri Ludwig Renn. En: GDR-Paco 1981, p. 16

Kiu konis Karl Zeisig el Leipzig?

La bulgara esperantisto Ĥristo Kanev, pri kiu ni skribis en la supra kontribuo serĉas informojn pri sia iama korespondinto. Kiu konis Karl Zeisig kaj lian sorton, bv. informi GDREA!

Marcel Boubou 1892—1942

Du dokumentoj okaze de la 90-jariĝo de lia naskiĝtago

Marcel Boubou estis unu el la plej aktivaj kaj eminentaj progresemaj francaj esperantistoj, antifaŝisto kaj pacbatalanto. Kune kun Honoré Bourguignon li motoris en Francio la „Internacion de Proleta Esperantistaro" (IPE) kaj la „Internacian Asocion de Revoluciaj Esperanto-Verkistoj" (IAREV).

I

Boubou naskiĝis la 22an de septembro 1892 en la urbo Beaugency. Li vizitis la intruistan seminarion de 1908—1911 en Orleans. Li instruis en La Baule, poste en Saint-Jean-de- la Ruelle, Orléans-Les Aydes ĉe la strato de la universitato kaj fine Dauphine-avenuo, pasie sin dediĉante al sia eduka tasko. Lia senlima mildeco, ĉiumomenta prizorgemo je la servo de esceptaj pedagogiaj kvalitoj havigas al li la korinklinon de liaj gelernantoj, la simpation kaj la fidon de ĉiuj.

Sed, dotita de rara inteligenteco, de admirindaj energio, firmeco, laborforto, Boubou ne limigas sian aktivecon al sia instruista funkcio. Kun apostola plenkredo, senĉese kaj ĉiurimede, li laboras por la emancipado de la laboristaro kaj la triumfo de la Respubliko. Pro tio, li estas arda sindikatisto, sincera partizano kaj konvinkita esperantisto.

Apenaŭ elirinte el la instruista seminario, li aliĝas al la socialista partio. Post la skismo en Tours, kiun li bedaŭras, li aliĝas al la Komunista Partio por kiu ĝismorte li energie laboras.

Kun manpleno da kamaradoj, li kreas kaj vivigas la unuecan sindikaton en kiu li speciale zorgas pri la Internacio de la Instrulaboristoj, kun Cogniot. Sed fervora aprobanto de la laborista unueco, li ĝojas vidi la du C. G. T. (Ĝenerala Laborista Konfederacio) unuiĝi, same kiel li aplaŭdus se kuniĝus la du grandaj laboristaj partioj.

Senlacigeble aktiva kaj persistega esperantisto en la franca „Federacio de proletaj esperantistoj" kaj en „Internacio de proleta esperantistaro" (IPE) li gvidas Esperanto-kursojn en la Labor-Borso, kaj ankaŭ perkorespondajn senpagajn kursojn al multaj instruistoj; li eĉ foroferas siajn feriojn al la somera Esperanta lernejo.

Liaj kursoj estas sekvataj kun rara intereso laŭ la unuanima opinio de la kamaradoj, kiuj profitis ilin. Dum la 30aj jaroj la faŝista danĝero pli kaj pli montriĝas, kaj spite sian sanon, kiu fariĝis nefirma pro vundoj ricevitaj kiel batalinto dum la milito de 1914—1918, li sin ĵetas en la kontraŭ-faŝistan lukton. Li pasigas siajn dimanĉojn kaj ofte siajn vesperojn en konferencoj, kunvenoj, helpata de kelkaj sindonemaj kamaradoj, en la vilaĝoj de Loiret, por kunigi la respublikanojn kaj montri al ili da danĝeron minacantan niajn liberecojn.

Lia varma voĉo, lia penetrema kaj malkaŝema rigardo, liaj persvadaj kaj klaraj argumentoj sciis konvinki.

La milito ne haltigas lian aktivecon sed li estas arestita la 18an de oktobro 1941 kaj kondukita al la malliberejo de la strato Eugene-Vignat. Tamen, lia fido estas neŝancelebla kaj la sekvantan tagon en la korto de la malliberejo, li diras al unu el siaj kunuloj en malfeliĉo: „Ni daŭrigos

la batalon ĉe la barakaroj". Kaj en Compiègne li rekuraĝigas la animstaton de multaj el la kamaradoj.

Li estas deportita al Germanio la 6an de julio 1942. Ve! La suferitaj mizeroj rapide detruis lian fizikan forton, kiu rezistis nur dank' al la sindonaj kaj amemaj zorgoj de lia kara kunulino.

Tiu nobla koro, de ĉiuj amata kaj precipe de siaj lernantoj, mortis en Auschwitz por sia idealo pri justeco kaj libereco.

> Eltiraĵo el „Liberté", libreto eldonita en 1946(?) de la nacia sindikato de la francaj geinstruistoj. („La sindikata sekcio de Loiret al siaj mortintoj, herooj kaj martiroj")

II

En 1939, akcentiĝas la militdanĝero, la sindikatistoj kaj komunistaj aktivuloj estas persekutataj pro la Daladier-dekreto deklaranta la komunistan partion kontraŭleĝa.

Certa nombro da aktivuloj estas arestitaj dum la „stranga milito" kaj kondukitaj en barakarojn aŭ en malliberejojn kiel administraj enkarcerigitoj. Boubou sin forsavas el tiuj arestadoj, kun la helpo de kamarado, li klopodas reorganizi la Komunistan Partion; senlace, ekster siaj instruhoroj, li kontaktas la iamajn kamaradojn unujn post la aliaj, rekomencas la kunligadon kun la parizaj aktivuloj, komisias la fervojistajn kamaradojn kunporti el Parizo ĉiujn skribaĵojn alvokantajn al Rezistado. Helpe de malnova „Gestetner" kaj ofte per netaŭga papero, li faras tiun laboron: li denuncas ĉiujn malbonagojn de la okupado en Loiret. Boubou estis unuafoje arestita en februaro 1940 same kiel pluraj aliaj kamaradoj; ili estis liberigitaj post 48 horoj, ĉar neniun pruvon oni povis trovi kontraŭ ili.

Sciante, ke li estis kontrolata, li devis lasi la direktadon al aliaj kamaradoj; sed sub lia kontrolo daŭris la batalo; li multe partoprenis per siaj konsiloj, siaj perfektaj konoj de la respublika movado en Loiret, formadon de la Nacia Fronto en Loiret en majo 1941.

Li komisiis kamaradojn kontakti la iamajn sindikatajn, socialistajn, radikal-socialistajn kaj kristan-sindikatistajn aktivulojn.

Triopoj formiĝis, precipe ĉirkaŭ Orléans, Montargis kaj Pithiviers, estis disdonataj ĉiusemajne pluraj miloj da flugfolioj: instrukcioj de la Nacia Fronto, skribaĵoj de la Komunista Partio, pri la farendaj sabotadoj ĉiuloke kie estas la malamiko.

Pro la gvidado de tiu batalo, mia kamarado Boubou estis arestita la 18an de oktobro 1941 kun deko da aliaj kamaradoj, forkondukita al Compiègne, kie li restis ĝis julio 1942.

Deportita de la germanoj al Auschwitz, nia kamarado Boubou, laŭ aserto de la sola kamarado, kiu revenis el tiu transporto de la 6a de julio 1942, same kiel liaj kunuloj, devis labori en la minejoj kaj nia kamarado Boubou mortis, fine de 1942 aŭ komence de 1943, lasante al ĉiuj, kiuj konis lin, neforgeseblan memoron.

Louis Breton

Ambaŭ tiujn dokumentojn ni ricevis de la franca komunista partio (federacio de Loiret). Kunmetis Willy Vildebrand

Fakleksiko sub interlingvistika aspekto

Pri la kvara interlingvistika seminario por GDR-sciencistoj en Ahrenshoop

Tiuj, kiuj legis „der esperantist“ (n-ro 110, 6/1981), p. 137—138, scias, ke jam 1981 dum la tria interlingvistika seminario de GDR en Ahrenshoop oni traktis la kvalitojn de planlingvo kiel faklingvo. Certagrade tiu temo denove ludis decidan rolon dum la kvara seminario, kiu okazis de la 21a ĝis 25a de novembro 1982, denove ĉe la aŭtuna Balto Maro, en la ripozloko Ahrenshoop. Kaj tamen, tiu seminario ne estis ripeto de la tria.

Pli forte ol en la tria estis elreliefigitaj la problemoj de la fakterminologio ĝenerale kaj aparte tiu en Esperanto kaj ties normigo. Ĉi-rilate la seminario estis profesia lingvoscienca preparo al la internacia UEA-aŭspicia aranĝo, kiu kunigis 30 specialistojn de 7a ĝis 12a de decembro 1982 en Bad Saarow sub la temo „Aktualaj problemoj de la scienc-teknika apliko de Esperanto“. Sed pri tiu seminario legu en „der esperantist“ 1/1983. La komunan inviton de Humboldt-Universitato (katedro pri komunikada scienco, prof. d-ro Georg F. Meier) kaj de la Fakgrupo Interlingvistiko/Esperantologio en Kulturligo de GDR sekvis entute 40 sciencistoj el jenaj institucioj: 7 universitatoj (sole el Berlin 11 sciencistoj, krome Dresden, Greifswald, Halle, Jena Leipzig, Rostock), 2 teknikaj altlernejoj (Leipzig, Ilmenau), 3 inĝenieraj altlernejoj (Dresden, Wismar, Zittau), 3 pedagogiaj altlernejoj (Dresden, Magdeburg, Zwickau), 1 altlernejo por ekonomio (Berlin), la Akademia-Eldonejo, Centra Instituto pri Biblioteka Scienco, Vysoka Škola Bańská Ostrava (ČSSR, d-ro Erich Spitz) kaj Kulturligo de GDR (d-roj Detlev Blanke, Giso Brosche, Till Dahlenburg; Wera Dehler), do entute 20 institucioj.

Precize 20 partoprenintoj jam estis partoprenintaj en la seminarioj 1—3. Interesa ankaŭ estas la konsisto de la partoprenantaro. 8 pli larĝe orientitaj lingvistoj, 2 specialistoj pri faklingvo (fakterminologio), 8 fremdlingvaj instruistoj kun faklingva specialeco, 2 bibliotekscienciistoj, 4 slavistoj, 4 ĝermanistoj, 1 romanisto, 2 anglistoj, 1 hindologo, 1 indonezisto, 1 mongolisto, 2 metodikistoj (rusa lingvo), 2 medicinistoj, 2 interlingvistoj. El tiuj 40 estis 4 universitataj profesoroj, 3 universitataj docentoj, 16 altlernejaj doktoroj (laborantaj kiel sciencistoj en altlernejoj) kaj 3 aliprofesiaj doktoroj.

Tiu klerec-nivelo, same kiel dum la pasintaj unuaj tri similaj seminarioj profilis la seminarion al profesinivela lingvo-scienca interdisciplina aranĝo, en kiu la problemoj de interlingvistiko — aparte la rolo de planlingvo (Esperanto) —estis enordigitaj en la prelegaron kaj debatojn.

La unuan tagon du grupoj („komencantoj“ kaj „progresintoj“) aŭskultis paralelajn prelegojn. Tiuj, kiuj ankoraŭ ne tro profunde okupiĝis pri interlingvistiko kaj esperantologio aŭskultis ĉiteman superrigardon prelegon de d-ro Detlev Blanke. Prof. d-ro Georg F. Meier kun la alia grupo traktis semantikajn aspektojn de la leksikologio. La aliaj prelegoj sekvis en la plenkunsido kaj ĉiam estis riĉe kaj verve debatitaj:

— doc. d-ro sc. Hans-Jürgen Mattusch (universitato Halle): Pri karakterizajoj de la faka leksiko,
— doc. d-ro sc. Wilhelm Hornung (Humboldt-Univ. Berlin): Problemoj de la terminologia normado,
— asistantino Gabriele Nagy (Humboldt-Univ. Berlin): Terminoj en la mongola lingvo,
— prof. d-ro sc. Joachim Dietze (universitato Halle): Pri la kreo de fakterminoj en Esperanto,
— prof. d-ro sc. Erich Mater (Teknika Altlernejo Ilmenau): Pri la organizo de storejo ĉe permaŝina prilaborado de planlingvoj (Esperanto),
— d-ro Detlev Blanke (Kulturligo): Kelkaj problemoj de la vortfarado en Esperanto,
— prof. d-ro habil. Georg F. Meier (Humboldt-Univ. Berlin): Leksikaj problemoj sub interlingvistika aspekto,
— d-ro sc. Erich Spitz (Ostrava, ČSSR): Problemoj de morfologio sub interlingvistika aspekto,
— d-ro Gerda Haßler (universitato Halle): Anglicismoj en la franca sub interlingvistika aspekto,
— d-ro Wolf-Dietrich Wendt (Humbolt-Univ. Berlin): Akiro kaj lernado de naturaj kaj planitaj lingvoj,
— d-ro Till Dahlenburg (Kulturligo, fakgrupo metodiko de Esperanto-instruado ĉe GDREA): Rego de gepatra lingvo kaj lernado de fremda lingvo — sub aparta konsidero de Esperanto,

— d-ro Erich-Dieter Krause (universitato Leipzig): Pri la rilato de faklingva al ĝenerallingva leksiko en meza Esperanto-vortaro (Germana-Esperanto),
— d-ro med. vet. Giso Brosche (Kulturligo, fakgrupo medicino ĉe GDREA): Veterinaraj terminoj en Esperanto,
— Wera Dehler (Kulturligo, fakgrupo medicino ĉe GDREA): Psikoterapeŭtaj terminoj en Esperanto,
— asistanto Hartmut Sörgel (Humboldt-Univ. Berlin): Demandoj de komputera terminologio, i. a. en Esperanto,

Krome d-ro Detlev Blanke dum unu vespero prelegis pri „Unulingvaj internaciaj mondkongresoj: planlingvo dum funkciado" (kun diapozitivoj kaj sonbendaĵoj).

Dum la seminario klare evidentiĝis:

1. La ĉefa temo estis la leksikologio/leksikografio.
2. Apartan lokon trovis la terminologia normado.
3. Neesperantistaj sciencistoj prezentis prelegojn, en kiuj Esperanto ludis fortan rolon, kvazaŭ fenomeno science tute kompreneble traktenda. (profesoroj Meier, Dietze, Mater; d-roj Spitz, Wendt; H. Sörgel)
4. Ĝeneralaj aŭ specifaj prelegoj sen rilato al Esperanto tamen en la diskuto ĉiam estis rilatigita al la planlingvo (d-roj Mattusch, Hornung, Haßler; G. Nagy).
5. Interlingvistoj aktivantaj en Kulturligo, respektive terminologiaj fakspertuloj prezentis altnivelajn kontribuojn, kiuj estis serioze akceptitaj flanke de la profesiaj lingvistoj. (d-roj Dahlenburg, Krause, Blanke, Brosche; s-ino Wera Dehler)
6. Ĉe profesiaj lingvistoj ofte mankas bazaj informoj pri rolo, funkciado kaj komunikaj kapabloj de planlingvo (Esperanto). Serioza, nealtruda prezento, enordigita en ĝeneralajn lingvistikajn problemojn volonte estas akceptita.

Ekspozicio de ĉ. 120 faklibroj kaj revuoj (interlingvistiko, esperantologio, fakvortaroj, Esperanto en scienco kaj tekniko, gazetaro) tre grave kaj konvinke ilustris la seriozecon de la traktata objekto.

Tiu seminario kun 40 partoprenantoj estis la ĝis nun plej forte vizitita. Ĉirkaŭ 15 pluaj sciencistoj planis partopreni sed devis rezigni pro profesiaj malhelpaĵoj aŭ pro malsano. Evidente la serio de la seminario jam firme establiĝis en la lingvoscienca pejzaĝo de GDR.

D. B.

La scienca terminologio

Kiel sciate, en biologio kaj medicino ĝis nun regas latinlingva internacia terminologio. Laŭ „Internacia kodekso pri nomenklaturo de bakterioj" terminoj de bakterioj devas esti kreataj el latinaj vortoj aŭ el latinigitaj alilingvaj, ekz. el familinomoj de sciencistoj. Tamen por terminoj de la plej malaltaj rangoj de klasifiko, por tiel nomataj infrasubspeciaj taksonoj, la kodekso permesas uzi vortojn el iu ajn lingvo, ciferojn, formulojn k. s.

Eluzante tiun ĉi permeson armena bakteriologo S. Ŝ. Ter-Kazarjan en la „Klariga vortaro pri nomenklaturo de bakterioj" i. a. skribas: „Por indiko de serologiaj variantoj de streptokoko kaj stafilokoko, trovitaj en USSR, ni proponas sekvantajn titolojn en la lingvo Esperanto."

Poste sekvas vicaj numeraloj de „unua" ĝis „tridek dua" kaj ankoraŭ „kvardek kvara" kaj „kvardek sesa" (paĝoj 113—114 en la libro „Projekt meĵdunarodnovo kodeksa nomenklaturi bakterij". Perevod s anglijskovo S. Ŝ. Ter-Kazarjana i S. L. Paŝarjana. Jerevan 1974). Sur paĝoj 196—198 de la nomita libro tiuj numeraloj estas uzataj por indiki konkretajn titolojn de la nomitaj bakterioj kun jena rimarko en piednoto: „Vd. Esperanto-rusan vortaron de E. A. Bokarev. Sov. Enciklopedija, M., 1974".

En privata letero mi demandis k-don Ter-Kazarjan, ĉu li estas esperantisto kaj dum kiuj cirkonstancoj aperis la propono. Pri la unua demando li respondis negative, tamen laŭ interkonsiliĝo kun akademiano G. Sevak (1981 forpasinta esperantisto el Jerevan) li enkondukis la supre nomitajn erojn por la terminoj, ĉar numeraloj en Esperanto estas pli simplaj kaj tial pli oportunaj ol la koncernaj latinaj numeraloj.

A. Vaitilaviĉius

Bernhard Golden

Pri la esploro de la germano komponento

Ĉe la fino de la artikolo „Ĉu germana aŭ angla?“ (*der esperantist*, 1/1982, n-ro 111, p. 9—12) la aŭtoro Manfred Arnold demandas: „Ĉu io ne estas korekta en miaj priskriboj, ĉu estas mankoj?“ Estas vere malfacile scii, kiel kaj kie komenci ĝustigi kaj kompletigi tiun supraĵan pritrakton de interesa kaj grava temo. La esperantologio jam ne estas en siaj vindotukoj. Pluraj verkoj estis publikigitaj, traktantaj la rilatojn inter Esperanto kaj ĝermanaj lingvoj, sed la aŭtoro evidente ne scias pri ili, do li agas tre nescience kaj malekonomie. Anstataŭ uzi rezultojn de antaŭaj esploroj por kompili la ĝermanan parton de tre bezonata etimologia vortaro de Esperanto, li simple kompilas vortlistojn, kiuj ne sufiĉas por indiki la etimojn de la Esperantaj vortoj, kiujn li citas. Ŝajnas, ke krom *Plena Ilustrita Vortaro,* li uzis por sia analizo nur germanlingvajn leksikografiajn verkojn kiel *Der Grosse Duden* kaj *Kleines etymologisches Wörterbuch der deutschen Sprache.* Ĉi-sube mi mencios kelkajn nemalhaveblajn verkojn, kiuj devas esti trastuditaj, antaŭ ol oni entreprenas ĉi-teman lingvistikan analizon de Esperanto.

La unua, plej verŝajne pionira, verko germandevenaj vortoj de en Esperanto estas *Was aus deutschen Wörtern im Esperanto geworden ist* (Kio fariĝis el germanaj vortoj en Esperanto) de Felix Maier-Crossen, eldonita de Richard Sattlers Verlag en Lejpcigo en 1908(?). En 1936 la usona lingvisto Norman A. McQuown verkis sian magistran tezon ĉe la Universitato de Ilinojo; ĝi titoliĝas *A Comparative Study of Esperanto from the Standpoint of Modern German* (Kompara studo de Esperanto de la starpunkto de la moderna germana lingvo). Ankoraŭ ne publikigita, tiu verko estas havebla fotokopie de la universitato en Urbana, Ilinojo, Usono. Ankoraŭ unu anglalingva studaĵo estas „Zamenhof's Germanismus“ (La germanismoj de Zamenhof), referaĵo de Pierre Ullman, prezentita ĉe simpozio pri gepatralingva influo sur Esperanton en Urbana-Champaign, Usono, en majo 1980.[1]) W. E. Collinson komparas ĝermanajn lingvojn kun Esperanto en „La strukturo de Esperanto kompare kun tiu de kelkaj nordeŭropaj lingvoj“ (*Lingva Kritiko,* vol. 1, n-ro 26, oktobro 1934, p. 2—3; n-ro 27, januaro 1935, p. 2—3; n-ro 28, marto 1935, p. 3—4). La sama aŭtoro pritraktas la anglan lingvon en „La gramatika strukturo de la angla lingvo kompare kun tiu de Esperanto (*Scienca Revuo*, 1958, vol. 9, n-ro 1 [33], p. 6—13).

Tria verko el la plumo de prof. Collinson estas „Germanic Elements in the Vocabulary of Esperanto“ [Ĝermanaj elementoj en la leksiko de Esperanto], *Esperantologio,* 1959, vol. 2, p. 1—12). Du verkoj utilaj por komparo de la angla lingvo kun Esperanto estas *Notes on English Grammar for Students of Esperanto* (Notoj pri la angla gramatiko por lernantoj de Esperanto) de Gabriel Dawson Lewis, (Londono, 1957) kaj „A Comparison between Word Formation in Esperanto and English“ (Komparo inter vortformado en Esperanto kaj la angla) de Olav Reiersøl kaj R. C. Marble (*Esperantologio,* 1949, vol. 1, n-ro 1, p. 53—58). La kialoj de la uzo de ĝermanaj leksikaj elementoj en Esperanto estas la temo de „La influo de Volapuko sur la ĝermanan komponanton de Esperanto“ de Bernard Golden; ĝi estos publikigita en *Li kaj Ni,* la festlibro por Gaston Waringhien (1982, TK-Stafeto, Antverpeno-La Laguna). Fine, utila konsultlibro por kompari parencajn vortojn en eŭropaj lingvoj estas *Naŭlingva Etimologia Leksikono* de Louis Bastien (1950, The Esperanto Publishing Company, Chorleywood, Rickmansworth, Herst., Anglio).

Kaŭzas surprizon, eĉ ŝokon, jena eldiro de la aŭtoro de la artikolo en *der esperantist:* „La kreinto de Esperanto laŭ mia kono nur parolis du ĝermanajn lingvojn: germanan kaj anglan.“ Ĉu s-ro Arnold neniam aŭdis pri la jida lingvo? Li certe ne legis la ĉapitron titolitan „Lingvoscio de L. L. Zamenhof“ en *Doktoro kaj Lingvo Esperanto* de Adolf Holzhaus (1969, Helsinki, 19–187). En tiu verko oni povas informiĝi pri la gramatiko de la jida lingvo, kiun Zamenhof verkis, kaj legi ankaŭ liajn originalajn poemojn en tiu lingvo. En siaj fakaj verkoj István Szerdahelyi kaj Fabrizio Pennacchietti emfazas la gravecon de la jida lingvo por esperantologiaj esploroj, kaj d-ro David L. Gold el la Universitato de Haifa jam publikigis detalhavan verkon, „Towards a study of possible Yiddish and Hebrew influence on Esperanto“ (Por studo de ebla jida kaj hebrea influo sur Esperanton), en *Miscellanea Interlinguistica* (1980, Tankönyvkiadó, Budapest, p. 300–366).

Analizo de la etimologioj proponitaj de s-ro Arnold bezonas ampleksan traktadon, do mi dediĉos apartan artikolon al tiu temo.

Recenzo pri „Bulgarino“ 1979

Tute sub la signo de la Internacia jaro de la infano, proklamita de UN, estis farita la jara eldono de la bulgara ĵurnalo „Bulgarino“ por 1979.

Multaj artikoloj de tiu-ĉi belega kajero okupiĝis pri la zorgo en la diversspecaj antaŭlernejaj institucioj, la infanĝardenoj kaj -vartejoj, pri la edukado kaj instruado de la infanoj kaj junuloj en la diversspecaj edukinstitucioj kaj pri la abundaj eblecoj de la plua edukado kaj de la plibonigado de la libertempoj en parkoj kaj pioniraj domoj. La sociala kaj saneca helpo, la medicina zorgo por la patrino kaj infano antaŭ kaj post la nasko, la socialpolitikaj elspezoj kaj la klopodoj plej bone ankaŭ prepari infanojn kun denaskaj aŭ poste akiritaj difektoj por ilia estonteco, ĉio-ĉi montras tre imprese la klopodojn por la daŭra plibonigo de la vivkondiĉoj jam dum la infanaĝo en Bulgario.

En ĉiuj artikoloj oni rimarkis kiom da flego la socialisma ŝtato donas al sia juna generacio tiel kreante la kondiĉojn por ĝ sana kresko al kleraj kaj konsciaj homoj de ĝ socialisma ŝtato.

Aparte atestoforta estis por mi la artikolo, kiel Bulgario donis sian kontribuon por la Internacia jaro de la infano. En ĝi oni pritaksis la realigon de la dek principoj, kiujn proklamis UN en la Deklaracio pri la rajtoj de la infano jam 1959. Kaj ĉi tiun bilancon oni povas fiere montri. Ne laste tial, ĉar ankoraŭ nuntempe en la mondo malsatas milionoj da infanoj.

Ne nur la atingitaj pozitivaj rezultoj estas montrataj sed ankaŭ tio, kion Bulgario ankoraŭ volas atingi. Ankaŭ tio enhave riĉigis la ĵurnalon.

Monika Schrage

★

Bona Komenco

J. Klement, D. Koĉvara, M. Turková: Sur la du frontoj.

Kontribuo de la historio de la ĉeĥa klasbatala Esperanto-movado. Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Prago 1981, 32 p.

La riĉe bilddokumente ilustrita broŝuro estas la unua monografieto pri historio de la laborista Esperanto-movado en Ĉeĥio kaj espereble instigos al pli detalaj esploroj. La ĉapitroj sekvas la plej gravajn etapojn, kiuj estas karakterizaj ankaŭ por aliaj LEA-oj en Eŭropo: I. La Laborista Esperanto-movado en Bohemio ĝis 1914. II. Oktobra revolucio kaj la movado por la lingvo internacia. III. Por la klasa karaktero de la proleta Esperanto-organizo. IV. Por la unueca fronto kontraŭ la faŝismo. V. Post la dua mondmilito. Kritiki oni bedaŭrinde devas la neprecizajn fontindikojn ĉe citaĵoj. Pli riĉa bibliografio kaj fontoindikado certe helpus al estontaj esperantistoj pri la temo. Entute bona komenco. La broŝuro haveblas ĉe GDREA.

D. B.

Terminologiaj rimarkigoj

En numero 112 de „der esperantist“ aperis „6 tezoj pri terminologia laboro“ kaj „Proponoj por terminologia laboro“ de W. Dehler. Pri tiuj tezoj kelkaj rimarkigoj ŝajnas al mi necesaj.

1. Demokratieco

Ambaŭ artikoloj ŝajnigas, ke terminologio estas tre demokratia afero, kiun oni povas realigi per enketado, kolektado de terminoj, internacia diskutado, akordigo. Tio ne estas ĝusta. Terminologio dependas de ekonomiaj kaj politikaj cirkonstancoj. Terminon kreas arbitre kaj diktatore tiuj, kiuj kreas la koncepton (aĵon). Kaze de tradukado/fremdlingva verkado pluraj faktoroj decidas pri ekzisto kaj vivdaŭro de terminoj: famo kaj verkproduktivo de aŭtoro, personaj gusto kaj arbitreco de redaktoroj, eldonkvanto kaj famo de revuoj k. a. Do temas pri nelingvaj faktoroj. Tre bona ekzemplo estas la vorto „kibernetiko“. En PIV ĝi ne ekzistas, ĝi devus troviĝi inter kiasmo kaj kibico sur pĝ. 507. Sur pĝ. 142 ni legas „cibernetiko“. La klasika vorto „cibernetiko“ estas jam pli malpli forpelita, tion ŝajne kaŭzis la ofta uzo de „kibernetiko“ fare de profesoro Frank (Paderborn).

2. Fakula memstareco

La dua tezo asertas, ke la necesan terminologian diskuton devas fari la fakuloj mem, lingvistoj nur konsilu. Tion mi forte kontestas. Se oni lasas la tradukon/rekreadon de terminoj simple al fakuloj, tiam mi vidas la danĝeron, ke multaj tradukantoj adaptas anglan aŭ latinidan vorton ortografie al E-o. Sed E-o havas proprecojn, kiujn konas nur lingvistoj kaj spertaj tradukistoj. Male al naciaj lingvoj ĝi ne konas verajn fremdvortojn, ĉar ĝi facile alproprigas al si ĉiun ajn vorton. Aliflanke ĝi estas ege fleksebla, do ofte ne bezonas novakcepton. Kelkfoje la fleksivo de E-o komplikigas la situacion. En la revuo „esperanto“ n-ro 869 (5/1978, pĝ. 90) troviĝas artikolo de F. Lo Jacomo pri matematikaj terminoj. Ni sciiĝas, ke la traduko de la nocio „Ungleichung“ estas malfacila, ĉar E-o ebligas la vortumojn malegalaĵo, neegalaĵo, komparaĵo, mal/pliaĵo, malekvacio. Eble eĉ pliajn. Tion decidi povas ne nur la fakuloj. La lingvaj kompetentuloj havos la lastan vorton — ili ja ne estas eksterfakaj stultuloj.

3. Organiziteco kontraŭ decidrajto

Kompreneble ĉiu laboro estu organizata. Sed kiu formo de organizo favoras por terminologia laboro? Mi vere ne scias. Internaciaj komisionoj fakte ne funkcias. Kaj eĉ se ni havos komisionon: Kiujn rajtojn ĝi havos? Ĉu iu ajn revuo devos sekvi ties decidojn? Ne. Ĉiu plu uzos siajn proprajn terminojn, post dekjaroj ni eble legos keramiko anstataŭ ceramiko aŭ komplotilo anstataŭ komputilo (cetere komputilo laŭ PIV ne estas komputero sed mezurilo, krome komputatoro estas trukarte direktata aŭtomato). Eĉ ne la vortoj en PIV estas devigaj.

4. Tempo kaj komputero

Slipoj estas bela afero, speciale ĉar en la angla kaj germana lingvoj tiu vorto signifas kalsonon. Sed por terminologia laboro ili certe ne plu taŭgas. Ni vivas en 1982 (ĉu vere). Por terminologia laboro laŭ mi necesas

— 1 e tempo por legado de revuoj kaj faklibroj,
— 2 e komputero kaj
— 3 e homo, kiu havas 1 a-aĵon kaj 2 a-aĵon.

Mi esperas, ke mi ne estas la unusola, kiu reagis je la supre menciitaj artikoloj. La tempo jam estas tromatura por serioza terminologia laboro. Se mi devus vortumi tezon pri terminologio, mi skribus: Terminologia laboro eblas nur kadre de faka verkado. Tial ni unue subtenu la eldonadon de sciencaj libroj kaj revuoj. Sen tio terminologia laboro estas sensenca kaj neebla.

Michael Lennartz

Ni ricevis

La Laponoj de Norvegio kaj ilia historio. Tiu superrigarda materialo, verkita de prof. d-ro Asbjorn Nesheim kaj eldonita de la Reĝa Norvega Ministerio de Eksteraj Aferoj en Oslo, informas sur 8 grandformataj ilustritaj paĝoj pri lapona etno, de kiu granda parto loĝas en norda Norvegio.

La broŝuro estas senpage havebla ĉe Norvega Esperanto-Asocio (Box 942 Sentrum, Oslo 1).

★

Volumoj de „Interkomputo“

Jenaj volumoj de la internacia scienca kolokvo „Interkomputo“ 1982 estas mendeblaj ĉe Haus der Ungarischen Kultur, 1020-Berlin, Karl-Liebknecht-Straße 9:

— Ilona Koutny (Red.): Homa lingvo kaj komputilo. Interkomputo, Budapest 1982. Neuman Janos Számitógéptudómányj Társaság. ISBN 9638431253/ISBN 9638431261
— Koutny: Apliko de komputiloj en psikologio, medicino kaj agrikulturo, ISBN 963—8431—25—3/963—8431—30 X
— Koutny: Teoriaj kaj praktikaj problemoj de la programado. ISBN 9638431253/9638431318
— Koutny: Apliko de komputiloj en industrio kaj administrado. ISBN 9638431253/9638431306
— Koutny: Matematiko, instruado de matematiko kaj de komputotekniko. ISBN 9638431253/963843127 X
— Koutny: Mikrokomputiloj, periferioj kaj aplikoj. ISBN 9638431253/9638431283

Prezo por 6 volumoj ĉ. 100 markoj.

Pri la ege grava kolokvo ni raportas en der esperantist 1/83.

El Hungario

Zánka

La nomo de Zánka estas vaste konata en Hungario. Tie, apud Balatono situas la plej granda hungara pionir-tendaro kun la distingita titolo: Pionirurbo, Esperantistoj malpli konas tiun nomon, kvankam oni ĉiujare okazigas regule ĉi tie Pioniran Internacian Tendaron (PIT), en 1982 inter la 30a de junio kaj la 13a de julio jam la 15an fojon!

Strange, esperantistoj, ne fieradas pri tiu, sendube esence grava atingaĵo. Verŝajne oni povus trovi nenie en la tuta mondo pli konvenajn, pli optimumajn cirkonstancojn por Esperanta, interinfana, movadkaraktera okupado kaj samtempe por efika propagando. Imagu: financaj zorgoj ne ekzistas. Esperantistaj infanoj pagas nur simbolan monsumon, nur iom pli multe ol la kosto de tagmanĝo en ordinara restoracio! Ankaŭ eksterlandanoj kutimas ĉeesti: bulgaroj, poloj, jugoslavoj. La cirkonstancoj estas favoraj: krom bonaj manĝkaj dormeblecoj, apartigita plaĝo ĉe Balatono por baniĝi, modernaj konstruaĵoj. Samtempe ĉeestas 3000 infanoj (10—14 jaraj). La pionirurbon kutimas viziti konataj diplomatoj, kosmonaŭtoj, muzikensembloj, kantistoj, aktoroj, pupistoj, magiistoj kaj aliaj, dume svarmas ĵurnalistoj kaj reporteroj de radio- aŭ televidostacioj.

Kial silenti pri Zánka?! Bedaŭrinde, ne tute senkaŭze. Ĝis nun ni ne sukcesis plenumi la plej evidentajn pretendojn: ke la gvidantoj de Esperanto-subtendaro estu profesiaj pedagogoj, scipovu Esperanton, estu spertaj kaj laboremaj; kaj la infanoj havu kuraĝon kaj lingvan konon por interkompreniĝi en internacia medio; ili elstaru pri bona konduto, inteligenteco, flua parolkapablo en Esperanto, kaj ne pro stulta fanfaronado.

Pasintsomere oni sukcesis iom rebati la misfamon. Oni jam komencis organizi konvenan instruistaran stabon hungaran por la sekva PIT.

Sed oni ne sukcesas fari antaŭpaŝon izole . . .

Estus bezonate, ke eksterlandaj pedagogoj povu akiri rajton ĝustatempe je partopreno, laŭeble kun propra, 10 persona, bone preparita grupo ĉe Monda Turismo, kiu prizorgas la eksterlandajn varbadojn.

Ĉeestu nur tiuj infanoj, kiuj meritas pro bona konduto kaj lingvoscio la akcepton. Ĉar PIT — ne estas lernejo por instrui Esperanton, sed ripozejo kaj amuzejo por infanoj. La celo estas: esperantistaj infanoj povu utiligi sian lingvoscion dum ludoj en internacia medio!

Jen la adreso: Zsuzsa Csiszár, H-8100 Várpalota, Kulich Gy. u. 25. V. 16.

TEJO-seminario en Hungario

La progresema Esperanto-movado ĉiam pledis por neesperantaj temoj en E-aranĝoj kaj kunlaboro kun neesperantistaj organizaĵoj. Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO) jam plurfoje praktikis tiujn seminariojn. Unuafoje tio nun okazis en socialisma lando. Hungara Esperanto-Junularo (HEJ) kunlabore kun la nacia interfaka Studenta Rondo (ITDK) kaj TEJO aranĝis de 15a ĝis 22a de aŭgusto 1982 la seminarion „Homaj loĝlokoj hodiaŭ kaj morgaŭ“ en Szentendre ĉe Budapeŝto. Mi ŝatas emfazi tion: La bazo ideo, nome trakti neesperantan temon en malfermita seminario, estas bona kaj imitinda.

La aranĝon partoprenis esperantistoj el USSR, Bulgario, Hungario, Pollando, GDR, Jugoslavio, Usono, Brazilo Francio, Britio, Italio, Hispanio, FRG, Okcidenta Berlino kaj granda nombro da hungaraj studentoj. Do la partoprenantoj povis ĝui la unikan etoson de vere internacia Esperanto-aranĝo.

Prelegis pluraj eksterlandaj sciencistoj. Pro la amasa ĉeesto de neesperantistoj oni spertis malagrablajn kromefikojn. Preskaŭ ĉiuj prelegoj kaj diskutadoj estis tradukataj respektive en la lingvojn hungaran, anglan kaj Esperantan. Oni disponis pri plej modernaj komunikiloj. Sed aperis la konataj fenomenoj de plurlingva konferenco: tempoperdo pro disdono de teknikaĵoj, informperdo, nefunkciantaj teknikaĵoj. Evidente Esperanto donas neniun avantaĝon, se ĝi ne estas la **sola** komprenigilo.

La administrado de la aranĝo ne kontentigis min.

Por la partoprenantoj el socialismaj landoj la kotizo estis preskaŭ 400 mk. Por unusemajna seminario tio estas tro kosta. Inkluzive de vojaĝkostoj kaj poŝmono la necesa sumo kreskas preskaŭ ĝis monata salajro. Vojaĝoficejo por la sama prezo ofertas dusemajnan restadon ĉe marbordo.

El inter la prelegoj elstaris tiuj de Horst Heinicke (FRG, arkitekto) pri urbosanigado, de Elliot Aronson (Usono, socipsikologo) pri novspeca instruada metodo kaj de György Kepes (hungardevena Usonano) pri moderna arto. Okazis vizito al libenraera muzeo ĉe Szentendre kaj ekskurso al Budapeŝto kun rigardado de piroteknikaĵo. Finiĝis la seminario per gaja sidado kaj kantado ĉirkaŭ tendarfajro.

Michael Lennartz

El eksterlando

Radio Polonia en Esperanto

Jen la tempoj:

6,30 — 7,00	41,27; 48,90; 50,04; 75,85; 200 m (7270, 6135, 5995, 3955, 1503 kHz)
12,00 — 12,25	31,50; 41,99 m (9525, 7145 kHz)
17,30 — 17,55	41,18; 49,22 m (7285, 6095 kHz)
20,30 — 21,00	41,18; 49,22 m (7285, 6095 kHz)
22,30 — 22,55	41,18; 49,22; 50,04; 75,85; 200 m (7285, 6095, 5995, 3955, 1503 kHz)

(laŭ mezeŭropa tempo)

En la programo estas i. a.:

Lunde: „Aŭskultantoj por aŭskultantoj“
Marde: „Trarigardo de la Esperanto-gazetaro“
„Klubo de Korespond-aktivuloj“ (ĉiun duan mardon)

Merkrede: „El la vivo de PEA“
Ĵaŭde: „Leterkesto“

Vendrede: „Pollando — hodiaŭ“
Sabate kaj diamanĉe:

„Panoramo de internaciaj eventoj“
„Kroniko de la semajno“
„Esperanto-ekspreso“
„Literaturaj programoj“

Radio Polonia rezervas al si la rajton fari ŝanĝojn en la programo.

Radio Polonia, Esperanto-Redakcio
00-950 Varsovio, Poŝtkesto 46, Pollando

Denove IREN

En tiu ĉi jaro (1982) mi denove partoprenis kiel sola nevidantino al IREN en Abaliget kun granda plezuro. Estis la 15a IREN. Esperantistoj el naŭ landoj vizitis Abaliget, eĉ unu el Meksikio. Franca esperantisto faris malgrandan filmon kaj montris la vivon de la esperantistoj ĉe ekskursoj, lingvoperfektigado, kantado ktp. La programo ege plaĉis al mi kaj inter la esperantistoj el diversaj landoj mi sentis min feliĉega. Mi preskaŭ forgesis, ke mi ne vidas. Mi ĉion plene ĝuis kaj deziras ofte partopreni al IREN. Nun mi pensas kun ĝojo pri la 68a Universala Kongreso kaj la Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj 1983 en Hungario.

Ursula Heiden, Rostock

Islanda Esperanto-pioniro en antologio

La eldonejo Verlag Volk und Welt Berlin (GDR) 1980 eldonis antologion kun rakontoj de 27 islandaj verkistoj sub la titolo „Eltrovoj“ („Erkundungen“). La antologio, kiun redaktis Bruno Kress, ankaŭ entenas rakonton de Thorbergor Thordharson („Alportu la drakon“). Sur paĝo 14 la aŭtoro mencias la Cseh-instituton per Esperanto-instruado en Den Haag kaj sur paĝo 278 oni mencias en la bibliografiaj indikoj, ke Thordharson verkis instrulibrojn por esperantistoj. Li estas sendube unu el la plej gravaj pioniroj de Esperanto en Islando kaj verkis i. a. la superrigardan libron.

Medioprotekta Laborbrigado en Szentendre

Lastsomere mi partoprenis laborbrigadon por esperantistoj okazintan en Hungario pri la medioprotekto en la urbeto Szentendre. La laborbrigado okazis de la 4a ĝis 22a de julio 1982. La partoprenantoj venis el Bulgario, Ĉeĥoslovakio, GDR, Hispanio, Hungario, Jugoslavio kaj Pollando. Ili estis plejparte gejunuloj.

Ni loĝis en lernejo, kiu troviĝis en kvieta kvartalo de la urbeto. Malantaŭ la lerneja domo estis arbareto kaj rivereto. La rivereto estis nia laborejo, ĉar ĝi estis malpurigita de elfabrikaj forfalaĵoj kaj de aŭtistoj ŝanĝintaj la oleon de siaj veturiloj. Ni konstruis barajojn el ŝtonoj kaj arbustoj en la rivereton por elfiltri la malpuraĵon. Jam post kelkaj tagoj videbliĝis klariĝo de la akvo. Krom tiu ĉi laboro ankoraŭ estis purigita la apudaĵo de la rivereto kaj oni konstruis pormigrajn vojojn en la arbareto. La laboro entute estis agrabla kaj bona laŭ mia opinio tial, ĉar la tutan labortempon ni estis en la naturo kaj ĉar la senco de la laboro al ĉiu estis klara kaj komprenebla.

La laboro ĉiam daŭris ĝis tagmanĝo. Post la tagmanĝo estis aŭ iu programo (ekzemple rigardado de muzeo aŭ baniĝo en tre bela publika naĝejo) aŭ libera posttagmezo. Tiel ekzistis eblecoj ekkoni la urbojn Budapeŝto kaj Szentendre. Vespere kelkfoje okazis prelegoj pri diversaj medioprotektaj temoj aŭ diskotekoj. La unuan dimanĉon ni entreprenis aŭtobus- ekskurson al la urboj Višegrad kaj Esztergom. La duan dimanĉon ni trapromenis Budapeŝton.
Dum la tuta tempo regis gaja Esperanto-atmosfero. Ĉiam ni ŝercadis kaj kantis, eĉ dumlabore. Do ĉiuj estis malgajaj, kiam ili devis forlasi la laborbrigadon.
Post tiuj spertoj mi povas rekomendi al ĉiu juna entreprenema esperantisto partopreni Esperantan laborbrigadon, ĉar tio estas malmultekosta ebleco vojaĝi eksterlandan kaj renkontiĝi kun fremdlandaj esperantistoj.

Christoph Schmitz

Foto-Ausstellung in Budapest

Im Rahmen des Esperanto-Weltkongresses 1983 in Budapest wird eine Fotoausstellung gezeigt. DDR-Esperantisten, die sich mit Exponaten beteiligen wollen, erbitten Informationen bei Hans R. Schmidt, 2800-Ludwigslust, Schweriner Allee 35.

El eksterlando

En la lando de Dimitrov

Nia ĉijara ferio-vojaĝo kondukis nin dum la monatoj majo/junio 1982 tra Ĉehoslovakio, Hungario kaj Rumanion al Bulgario. Jam longe antaŭe ni estis fiksintaj la diversajn lokojn de nia restado kaj pro tio aranĝis kontakton kun esperantistoj. Ni pensis ĉe tio pri maro, suno kaj montoj, ĉiujn tiajn vidindaĵojn prezentas Bulgario multfoje, sed ĝi prezentis ankoraŭ pli multe. Nia unua restado estis Veliko Tarnovo kaj tie en la E-klubo nia unua renkonto kun Georgi Dimitrov. Samideanino el GDR prelegis pri li honore al lia 100a naskiĝtago. Ni pluveturis. En Sofio ni havis grandan travivaĵon vidi G. Dimitrov en la maŭzoleo. Ĉio en tiu ĉi lando staras en la signo de la jubileo. Nia sekvonta stacio estis Plovdiv kaj tie ĉi kaj tra la Rodopimontaro ĝis la urbo Smoljan, kiel en Pisanica ekestis nova Esperanta lernejo.

En Burgas poste ni travivis la festtagon de la bulgara scienco kaj kulturo, impresa demonstracio ĉe belega tago kaj surprize inter la multaj homoj ankaŭ la E-grupo el Burgas.

Poste ni estas gastoj en la klubo. Ni ricevis kiel gastdonacon broŝurojn pri Dimitrov en Esperanto.

Tiel pasis la belaj tagoj, ne nur per travivado de rava naturo sed ankaŭ de la nacia okazaĵo. La restado en Bulgario kaj en la aliaj gastlandoj estis por ni neforgesebla.

Ni dankas per tio al ĉiuj niaj E-geamikoj por ilia kora gastamo kaj helpo.

R. kaj Ch. Tomat

Konferenco pri Dimitrov en Sofio

Bulgara Esperantista-Asocio de la 5a ĝis 8a de junio 1982 en Sofio okazigis sciencpraktikan konferencon pri Georgi Dimitrov okaze de lia 100a naskiĝtago. La konferencon partoprenis pli ol 80 bulgaraj esperantistoj kaj gastoj el ĈSSR, GDR kaj Pollando. La Esperanto-Asocion en Kulturligo de GDR reprezentis ties prezidiano Jürgen Hamann, kiu prelegis pri „Kelkaj aspektoj de la kultivado de la heredaĵo de Georgi Dimitrov en GDR". Aperis libro kun la kontribuoj de la konferenco.

E – AGADO EN TIMISOARA SUR NOVA ORGANIZA ŜTUPO

La 7 an de Marto 1982, la Centro Esperanto-interlingvistiko de Timisoara organizis tuturban renkontiĝon de esperantistoj, cele grupigi ilin en pluraj laborgrupoj. La renkontiĝo okazis en la Universitato Timisoara. Ĝin partoprenis ĉirkaŭ cent personoj: gestudentoj, universitatanoj, fakuloj (kuracistoj, ingenieroj, diversfakaj instruistoj ktp.), reprezentantoj de verkistoj, jurnalistoj, laboristoj, reprezentantoj de junularaj organizoj kaj aliaj personoj pretaj por kunlabori por la progreso de la Internacia Lingvo.

La laborojn malfermis kaj gvidis Prof. d-ro Ignat Florian Bociort. Ĉeestis la gvidantaro de KEI kaj de Timisoara Centro. Parolis docento d-ro Cezar Apreotesei, aganta prezidanto de KEI, univ. asistanto Ioan Iercan, estro de Timisoara Centro kaj la ĉefoj de laborgrupoj. Oni starigis la sekvontajn laborgrupojn: organizan scienca-didaktikan arta-kultura-sportan, informan junularan, financan kaj kolektivon por eksterlandaj kontaktoj.

Profesoro Bociort prezentis detale la taskojn de ĉiu kolektivo, skizis la labormetodojn kaj ĉiu el la ĉeestantoj enskribiĝis en unu aŭ alia laborgrupo. Sekvis interesaj diskutoj. Evidentiĝis ke la laborplano proponita kaj la dumkunsidaj sugestoj entenas multajn kaj gravajn labordirektojn por la E-agado en Timisoara kaj tutlande.

Kiel kutime, la interkonsiliĝo finiĝis per kultura programo en Esperanto. Apartan aplaŭdon ricevis lernantina grupo el Pedagogia Liceo en Timisoara kiu kantis (esperantlingve) internaciajn kaj rumanajn popolkantojn.

Mioara Dobre

OrSEJT – 24

En apudtjumena turista bazejo „Piŝma" (okcidenta siberio) de 3.-16. 8. 1982 okazis la tradicia 24a Orientsovetia E-junulara tendaro OrSEJT-24, dediĉita al 60-jariĝo de USSR kaj partoprenita de pli ol 200 sovetiaj esperantistoj.

La ampleksa programo de la tendaro enhavis Someran universitaton kaj tradukistan kurson por spertuloj, paroligajn grupojn kaj ekzamenon por komencantoj, pactagon kaj festivalon de politika kanto kun partopreno de bulgaraj kaj mongolaj amatoraj artistoj. Okazis ankaŭ pluraj kulturaj kaj amuzaj aranĝoj.

Interesa montriĝis la aktivula konferenco, kiu traktis i. a. eksteran informadon pri Esperanto, pliefikigon de la interkluba spertinterŝanĝo, laboron de la junulara komisiono de ASE k. a.

La konferenco sendube helpis la esperantistojn pliproksimigi siajn vidpunktojn pri la temoj kaj kunordigi la interkluban kunlaboron. En la fino de la tendaro la plej aktivaj organizantoj kaj partoprenantoj estis distingitaj per honorfolioj de la urba junulara organizaĵo, kiu patronis la tendaron.

A. Korjubev

El scienco kaj tekniko

Esperanto-kurso en sovetia scienca periodaĵo

La scienc-populara revuo „Ĥimija i ĵiznj“ (Kemio kaj vivo), aperanta en Moskvo en 365 mil ekzempleroj (kiun legas ĉirkaŭ miliono da kleraj personoj), publikigas en la julia-oktobra numeroj de 1982 miajn materialojn: artikolon pri lingva problemo en la scienco kaj 16-lecionan kurson de Esperanto por scienc-teknikaj laborantoj. Ĉiu leciono ampleksas 2—3 tajpitajn paĝojn kaj konsistas el kelkfraza teksto pri scienc-teknika novaĵo, komento al ĝi, novaj radikvortoj kun traduko kaj rekomendo al la lernanto. La kurso estas emfazata kiel enkonduko al rapida lern-maniero de legado de scienc-teknika literaturo en kelkaj eŭropaj lingvoj. Studata leksiko: 500 radikoj plus 500 radikoj en aldona vortareto. La lasta teksto estas tradukenda kaj sendenda al la redakcio.

Por pleje sukcesigi la aferon, ni havas al vi jenajn proponojn: — Ni bezonos por la finstudontoj multajn adresojn de diversaj fakuloj por korespondado. Pri tio skribu al: Anatolo Gonĉarov, Molodjoĵnaja 38—10, SU 143000 Odincovo, Moskovskoj obl., USSR. — Estas dezirinda paralela laboro en diversaj landoj. Do estus bone, se vi aŭ alia kompetenta persono aŭ via E-Asocio, baziĝante sur la ekzemplo de „Ĥimija i ĵiznj“, traktus kun iu vialanda scienc-populara revuo pri publikigo de E-kurso por scienc-teknikaj laborantoj, eble, kun la moto „Lernu Esperanton por korespondi kun sovetiaj fakuloj!“. Ekstremokaze, oni povus publikigi la kurson broŝure en la revuo de via Asocio. La kurson vi povas ellabori mem aŭ, por ne perdi la tempon kaj fari la laboron unuece, adapti la nian.

La finstudontojn ni povus interkorespondigi, kio retenus ilin en la movado kaj akcelus aplikon de E en scienco kaj tekniko. Pri tio kaj pri ricevo de kopio de la unua parto de la publicaĵo (la artikolo kaj du unuaj lecionoj) skribu al mi: Boris Kolker, abonkesto 1125, SU Ufa 450025, USSR.

B. Kolker

ABONU al „SCIENCA MONDO“

REVUO „SCIENCA MONDO“ — aŭtoritata organo de Monda Federacio de Sciencaj Laboristoj, en kiu membras pli ol 450 000 sciencistoj de la tuta mondo aperas en lingvoj angla, franca, germana, rusa kaj — ekde 1976 — en Esperanto. Ĝi estas eldonata en Bulgario.

REVUO „SCIENCA MONDO“ estas luksa, grandformata, 32-paĝa, interesa. Aperas trimonate. Kvankam scienca, multaj artikoloj en ĝi estas en popularа kaj facile komprenebla Esperanto.

REVUO „SCIENCA MONDO“ — tre grave — estas plej malmultekosta en la mondo Esperanta revuo — jarabono nur 7.50 sv. fr., 3 rubloj aŭ ekvivalente en alia nacia valuto.

REVUO „SCIENCA MONDO“ estas abonebla de la esperantistoj el socialismaj landoj per la poŝto kaj el okcidentaj — per Universala Esperanto-Asocio (UEA), Nieuwe Binnenweg 176, NL 3015 Rotterdam, Nederlando. Bank Mees & Hope NV, Koolsingel 93, 3012 AE Rotterdam; konto 25.52.89.804.

Abono al „Scienca Mondo“ estas morala, materiala kaj kuraĝiga subteno de la revuo — eldono de grava neesperantista organizaĵo.

Do, la slogano „Ĉiu esperantisto — abonanto de revuo „Scienca mondo“ — estas trafa. Bonvolu subteni ĝin!

La revuo estas abonebla ĉe GDREA: 10 M.

Novaj universitataj lernolibroj

Unuan fojon en la historio de Esperanto la universitato de Budapeŝto eldonadas lernolibrojn pri Esperanto kaj interlingvistiko por studentoj. Jam aperis 1. „Eszperantó, Bevezetés és nyelvgyakorlatok“ (Enkonduko kaj lingvoekzerco) (1976, 307 p.), 2. „Metodologio de lingvostudo kaj parolalproprigo“ (1975, 377 p.), 3. „Krestomatio de Esperanta Literaturo“. Tekstoj, dataro, bibliografio, volumo I (1979, 466 p.) kaj 4. Bevezetés az interlingvisztikába. Történeti vázlat és forrástanulmány (Enkonduko en la interlingvistikon. Historia skizo kaj traktado de ĝiaj fontoj), (1980, 290 p.). Ĉiuj volumoj estas verkitaj resp. redaktitaj de d-ro István Szerdahelyi. Ili eldoniĝis kiel presitaj manuskriptoj en „Tankönyvkiadó“ (Lernolibro-eldonejo) en po 500 ekzempleroj.

Oni ankoraŭ planas eldoni jenajn titolojn: Gramatikoj, studoj, literatura krestomatio, IIa volumo, Interlingvistika glosaro, sistema Gramatiko, Literatura Krestomatio, IIIa volumo, Historio de Esperanto-Movado.

-e

SAEST 1982

Ĉefa temo de la 3a SAEST, okazinta de la 13a ĝis la 15a de aŭgusto 1982 en Česke Budějovice ČSSR estis la monda energiproblemo.

Pri tio prelegis, aŭskultis kaj diskutis esperantlingve 72 sciencistoj-teknikistoj el 8 landoj, inter ili 8 GDR-anoj.

La prelegoj grupiĝis pri

1. Bazaj problemoj de energiuzado de vidpunkto de diversaj sciencaj branĉoj kaj energiŝparemaj teknologioj (9 prelegoj)
   (GDR: Pri kelkaj energiproblemoj el la vido de arbarmastrumado, prelegita de d-ro Simon);
2. Ekonomiaj kaj sekurec-faktoroj de aviada trafiko, novaj motoroj kaj estontaj fueloj (brulaĵoj)
   (Kontribuo de R. Partecke, Eisenach: „Energikonsumo en la aertrafiko kaj eblecoj de energi-ŝparado");
3. Faka terminologio kaj traduko. Tie elstaris la prelegoj de B. Buŝa (Hungario) pri „La Zamenhofa spirito de la fakvortkreado" kaj la lingve brila kaj enhave bonega prelego de Wera Dehler (Berlin) pri ne nur bazaj problemoj de terminologio sed ankaŭ pri gvidado kaj realigo de la konkreta terminologia laboro. Pri tiu prelego okazis la plej vigla diskuto de la seminario.

Ankaŭ estas menciinda la diskutvespero, kiun partoprenis ing. Petar Todorov, respondeculo pri faka agado de UEA.

Ĉar la problemo „energio" restas daŭre en la sfero de intereso de la esperantistaj fakuloj, ankaŭ pro tio, ĉar Esperanto celas ŝpari al homaro energion de la plej alta rango, energion de la homa cerbo, kiu estas nun — en la tempo de la konfuza multlingveco — tiel neracie disipata, la partoprenintoj proponis en la komuna deklaro.

— ke pro graveco de la problemo kreiĝu intensa internacia kunlaboro, plejeble en la formo de internacia laborgrupo por energio;
— ke la faka agado de UEA, SEC kaj ISAE unuiĝu por akceli uzon de Esperanto sur la scienca kaj la teknika terenoj.
— ke la revuoj regule diskonigu informojn pri la entreprenataj agadoj, por tiel eviti duoblan aŭ eĉ pluroblan laboron en la movado.
— ke STS ĈEA daŭrigu aranĝadon de la seminarioj dediĉitaj ĉiam al iu grava ĝenerala temo;
— ke UEA en la sfero de sia faka agado subtenadu la agadon de sciencaj kaj fakaj aplikoj de Esperanto ne nur movade, sed ankaŭ materie.

Ni ne forgesu la porokazan kajeron de la revuo „La Progreso" eldonita far la samnoma E-klubo en Česke Budějovice omaĝe al SAEST, kun gravaj artikoloj de d-ro ing. Fritsch kaj ing. J. Laube.

Mi dankas al STS-ĈEA por tiu bone organizita kaj altnivela seminario, aparte pri la kolekto de prelegoj, sed ankaŭ por la porokaza „La progreso" kaj deziras al ni similan sukcesan SAEST 1984.

R. Partecke

★

Studentoj denove interlingvistikis en Samarkando

Inter la 14a kaj 23a de aprilo 1982 en Samarkando okazis la vica 11a Studenta Scienca Konferenco de Samarkanda Ŝtata Universitato „Ališer Navoi". Enkadre de la konferenco, dediĉita al la 60-jara jubileo de USSR, same kiel antaŭe funkciis sekcio interlingvistiko/esperantologio. Ĉi-foje laboron de la sekcio partoprenis studentoj el Samarkando, Moskvo, Novosibirsk, Krasnojarsk, Jerevan, Sverdlovsk, Riga, el frata Mongolio. Dum la sekciaj kunsidoj oni traktis 19 temojn:

1. Roza Ĥodĵanijazova (Samarkando): Lenina nacia politiko kaj egalrajteco de lingvoj
2. Mitan Ĥolikulov (Samarkando): Manieroj de interpreto de germanaj frazeologismoj en Esperanto (laŭ la materialo de la romano de Bruno Apitz „Nuda inter lupoj"
3. Zoja Starostina (Samarkando): Provoj de solvo de internacilingva problemo en la scienco
4. Raisa Jafasova (Samarkando): Medicina terminologio en Esperanto
5. Jelena Gorbatenko (Moskvo): La influo de la rusa lingvo je Esperanto
6. Ĥadiĉa Ĥafizova (Samarkando): La krea heredaĵo de Kalomano Kalocsay — elstara majstro de Esperanta poezio
7. Gurgen Ĉobanjan (Jerevan): Esperanto sen antaŭjuĝoj
8. Larisa Ĉen (Samarkando): Vortfarado en Esperanto kompare al la rusa lingvo
9. Okub Šamŝijev (Samarkando): Esperanto kiel kulturiga faktoro
10. Margarita Dautova (Sverdlovsk): Filozofiaj sistemoj de internaciaj planlingvoj
11. Ĥamza Bobomurádov (Samarkando): La rolo de internacia lingva komunikado en la evoluo de produktantaj fortoj
12. Iveta Dajne (Riga): La tipologio de la E-revuo „Paco"
13. Marta Matvijenko (Samarkando): Evoluo de internacia lingva komunikado
14. Inna Bulanova (Novosibirsk): Ekonomiaj problemoj de la fremdlingva instruado kaj tradukado
15. Enĥmaa Medreltijn (Ulan Bator — Novosibirsk): Historio de la mongola skribo kaj disvastiĝo de Esperanto en Mongolio
16. Jokub ŝamŝijev (Samarkando): Lingvoplano OMO

Recenzoj

INSTRUA AMUZO

Temas jam pri la dua kajero, kiun la aŭtoroj Stano Marĉek kaj Stano Markoviĉ prezentas al ni.

Sur 56 paĝoj vi trovas diversajn enigmojn kaj gajajn desegnitajn humuraĵojn. Certe multaj el vi entuziasme solvas krucvortenigmojn en via nacia lingvo aŭ almenaŭ jam provis fari tion. Jen bona okazo montri viajn spertojn ankaŭ en Esperanto. La enigmoj estas diversaj: malgrandaj kaj ampleksaj, facilaj kaj malfacilaj. Eĉ sen grandaj lingvaj spertoj oni povas komenci la solvadon. La solvado donas al vi ne nur amuzon, sed plivastigas ankaŭ vian vortprovizon. Al kursgvidantoj mi povas rekomendi solvi kun la kursanoj dum la kunvenoj komune iun enigmon aŭ aranĝi konkurson, kiu plej rapide solvos. La kajero estas taŭga helpilo por plivigligi la grupajn kunvenojn. Ĝi helpas kontroli la jam lernitan, instigas al uzado de vortaroj kaj enciklopedioj.

La aŭtoroj preparas jam la trian kajeron kaj mi ĝojus, se ĝi povus baldaŭ aperi.

Dieter Berndt

MEZE DE EŬROPO

Rigardante mapon de Eŭropo, oni konstatas, ke en ĝia mezo troviĝas Ĉeĥoslovaka Socialisma Respubliko. Pri ĝi temas la 100-paĝa libreto, kiun eldonis la ŝtata eldonejo Panorama en Praha. Sed ne pensu, ke antaŭ vi estas gvidlibro tra Ĉeĥoslovakio, kiu prezentas al vi turismajn lokojn kaj historiajn vidindaĵojn; vi ege erarus. Ĉi-foje temas pri io tute alia, kiel oni povas legi en la subtitolo, pri „Skize pri la historio de Ĉeĥoslovakio".

La libreto prezentas al ni la riĉan historion de tiu ĉi lando. Vi ekscios pri la alveno de la Slavoj en la teritorion, pri la Grandmoravia Regno, pri la unuopaj reĝoj ĝis la fama Karlo IV. Sekvas ĉapitro pri la husana revolucio, pri la komenco de la laborista movado ĝis la evoluo de la ĉeĥoslovaka ŝtato survoje al socialismo.
Multaj bildoj akompanas la tekston kaj igas la libreton pli alloga kaj eble ankaŭ instigos al vizito de historiaj lokoj en Praha kaj aliaj urboj.
Abundas historiaj datoj kaj nomoj, kio ne ĉiam faciligas la legadon. Je la fino de la libro vi trovas rimarkojn pri elparolo de ĉeĥaj kaj alilingvaj vortoj troviĝantaj en la teksto. Tre taŭgaj estas la klarigaj notoj. Bedaŭrinde nur 9. Ne ĉiu leganto havas sufiĉajn antaŭsciojn pri ĉeĥoslovakio kaj tial estus necese doni ankoraŭ pli multajn klarigojn. Enigmo estas por mi, kial oni tradukis proprajn nomojn en la ĉeĥan lingvon. Mi pensas, ke la libro estas ĉefe destinita por fremdlandanoj, kiuj certe ne estas scivolemaj kiel eble la germana urbo Meissen nomiĝas en la ĉeĥa lingvo. Tiaj rimarkoj estas oftaj kaj superfluaj.
La aŭtoroj koncentriĝas ĉefe al la ĉeĥa historio kaj la slovaka estas traktata sur nur kelkaj paĝoj. Bedaŭrinde.
Dum atenta legado oni rimarkas, ke la tradukon faris diversaj personoj. En la lastaj ĉapitroj oni trovas nenion riproĉindan. Alie en la komencaj ĉapitroj. Se ni preterrigardas kelkajn preserarojn, ne plaĉas al mi la uzo de superfluaj neologismoj, nekutimaj esprimoj (kromordinara, sidurbo, Sta. anstataŭ eksterordinara, sidejo, S-a), neplaĉaj gramatikaj formoj (tradukitis, uzatis, elpelitis ktp.). Sed tio estas nur „lingvaj makuletoj" en tiu interesa libro.
(Meze de Eŭropo. Esperantiĝis E. Seemanová, O. Knichal, A. Staňura Prago 1980, 90 p.) Harebla ĉe GDREA, 5 M.

Dieter Berndt

---

17. Lubovj Lapteva (Krasnojarsk): Laborista E-movado kaj ĝia rolo en la monda laborista movado
18. Ĥolikberdi Kazimov (Samarkando): Ekstralingvistikaj kaj lingvistikaj kialoj de relativa sukceso de Esperanto kiel funkcianta internacia planlingvo
19. Ĥonima Lukova (Samarkando): Lingvistika priskribo de la planlingvo Ido.

Pridiskuton de la prelegoj partoprenis docento V. R. Lemelev, kandidato de filologiaj sciencoj N. M. Ĉernenko, kandidato de biologiaj sciencoj V. Ju. T§ĉotkin, kandidato de kemiaj sciencoj, Maris Jakobson (Riga), universitata instruisto, K. K. Kaŝamovka. Dum la fina plenkunsido de la konferenco, prezidita far rektoro de Samarkanda Universitato akademiano A. K. Atoĥodĵajev, oni enmanĝis laŭdfoliojn al la plej eminentaj prelegintoj i. a. al 7 esperantistoj.

25jara historio de fama klubo

Londono vokas 1903—1978 Historio de la Londona Esperanto Klubo. Jen la titolo de interesa dokumentaro kaj materialkolekto, kunmetita kaj komentita de Harry Holms, kiu estis dum 20 jaroj prezidanto de unu el la plej aktivaj kaj renomaj kluboj esperantistaj, de la Londona.
La 131 paĝa libro (eldonita 1981) entenas multajn faktojn kaj detalojn el la kluba vivo, kiun partoprenis vico da internacie konataj esperantistoj. Trarigardante la libron, oni tute klare komprenas la neceson skribi kronikojn pri la grupoj kaj kluboj, ja ili estas grava dokumenta bazo por skribi la historion de la nacia kaj internacia Esperantomovado.

-e

Franca amiko skribas:

Pro memoro al sinjorino Hella SAUERBREY

Mi ne povas kredi, ke ŝi estas mortinta! Post paso de pluraj monatoj depost la alveno de tiu mortavizo, mia spirito, mia prudento rifuzas, ankoraŭ nun, tiun eventon.Kiomfoje mi relegis la kruelan frazon: „Hella SAUERBREY forlasis nin la 29an de Decembro 1981 por ĉiam"! Malgraŭ la pereiga vereco de tiu korŝira avizo mi ne konsentas tion, kaj mi ofte min surprizas serĉante en mia leterkesto la kutiman leterkoverton, kiu venis el Berlino, kaj sur kiu mi legis la konatan skribon de mia amikino.
Ŝi estis vera amikino por mi. Mi scias, pro sperto, kiom tiu vorto „amiko" estas ofte fuŝuzita, kiom ofte oni diras „amiko" al iu ajn persono, kiu fakte estas tute indiferenta al ni. Mi malfidas tiun nomon, kaj mi ĝin uzas nur tre malofte. Sed al ŝi, estis sincere, estis elkore, ke mi diris la du vortojn: „Kara amikino"! Dum 8 jaroj ni interkorespondadis, laŭlonge tiuj jaroj, mi konis, mi ĉiam admiris tiun personon agreblan, afablan, serveman, kaj ankaŭ tre kleran. Ŝi gvidis miajn unuajn paŝojn en la lernado de Esperanto, korektis sen malkomplezaj rimarkoj miajn stilajn, gramatikajn aŭ vortaretajn erarojn, ŝi min subtenis, kiam en unuaj tempoj mi intencis forlasi la internacian lingvon. Ŝi superŝatis literaturon, mi ankaŭ. La konformeco de niaj pensoj, de niaj ideoj, de niaj vidpunktoj rilate diversajn verkistojn, faris el ni paron da veraj amikoj. Ni interkorespondadis proksimume dufoje ĉiumonate.
Kaj nun ŝi estus mortinta? Ŝi estus forlasinta nin por ĉiam? Ĉu nun tiom da boneco tiom da afableco, tiom da klereco, estus por ĉiam malaperinta? Ĉu tiom da grandanimeco estus por ĉiam perdita? Estas neeble!
Kiel oni povus ĉiamigi la grandanimecon de Hella, kiel oni povus asocii ŝian nomon al io, kiu ligus ĉiujn ŝiajn geamikojn, pere de Esperanto? Ĉu vi ne havas ideon por atingi tiun celon? Mi estas grandaĝa-sepdeksesjara-, tro aĝa por krei aŭ entrepreni ion ajn, sed estus ĝojege, ke mi aliĝus, malfeliĉe nur perletere pro mia aĝo, al iu ajn movado, al iu ajn provo, por ke la memoro de Hella Sauerbrey ne perdiĝu. Mi esperas, ke iu inter la multaj geamikoj de Hella trovos la eblon iel, honorigi nian karan kaj estimindan amikinon. Ĉu estos vane, ke mi atendos ĕhon al mia peto?

Raymond Devendeville
17 Rue de la Jappe
59155 Faches-Thumesnil
Francio

„Itres" 82

De 6-a ĝis 10-a de oktobro 1982 renkontiĝis en la ercmontara urbeto Schwarzenberg esperantistoj el Ĉeĥoslovakio, Hungario, Bulgario kaj Germana Demokratia Respubliko, por turisme konatiĝi kun la vidindaĵoj en la okcidenta ercmontaro.
Laŭ kontrakta interkonsento de Esperanto-grupoj de Karlovy Vary kaj Schwarzenberg la jara renkontiĝo estonte okazos alterne en ambaŭ regionoj. Do 1982 Schwarzenberg, 1983 Karlovy Vary kaj poste denove en subdistrikto Schwarzenberg.
La urbeto Schwarzenberg evidentiĝis kiel ideala turisma centro. Laŭ bone organizita programo ni konatiĝis kun la pejzaĝo, historio, socia kaj kultura vivo. La 7an de oktobro (nacia festotago) la partoprenantoj ĉeestis manifestacion ĉe memorejo de liberigo kaj honorigis la sovetiajn heroojn per florkrono.
Dum la renkontiĝaj tagoj ni vizitis montominejojn (resto de la iam tie florinta mineksploato), la pumpilan akvorezervejon de Markersbach, la muzeon de fero kaj stano en Schwarzenberg kaj konatiĝis kun la lignoskulpta arto amatora. Inter la vesperaj aranĝoj speciale menciindas folklora prezento de la kulturgrupo „Tŝorlaŭaj najtingaloj". Oni akceptis Kontraŭimperiisman rezolucion. La tagoj de Schwarzenberg estis impresoriĉaj kaj bone akorditaj, regis kamaradeca etoso, enimo de l'tuto estis kamarado Rudolf Eichler kun siaj riĉaj spertoj.
Parto de la partoprenantoj poste vojaĝis al Karlovy Vary por tie fini la turisman renkontiĝon. Rudolf Hahlbohm

Interesa provo

En Praha la ĉeĥa asocio de ĵurnalistoj okazigis la 18an de novembro 1982 en la domo de ĵurnalistoj gazetaran konferencon okaze de la jaro de komunikado (1983). La konferencon partoprenis 17 ĵurnalistoj diversmediaj kaj funkciuloj de Ĉeĥa Esperanto-Asocio.
Gravas substreki, ke al la konferenco invitis la asocio de ĵurnalistoj. Post enkondukoj flanke de la prezidanto de ČEA, d-ro Jermař, kaj la sekretario Zdenko Křimsky, ekestis vigla debato pri la rolo de Esperanto en la internacia komunikado. La debaton gvidis Jaroslav Klement, membro de la ĉefa estraro de ČEA.
La konferenco estis interesa provo informi la amasmediojn pri Esperanto.

Soveta gasto

La soveta esperantisto Nikolai Ryssovec vizitis dum julio 1982 por kelkaj semajnoj la Esperanto-grupon Schwarzenberg/Ercmontaro.

GDR — Paco 1982

Aperis nova kajero de la bulteno „Paco“, organo de la MEM-sekcio de GDR. Ankaŭ ĉijare la 40-paĝa riĉe ilustrita kajero entenas multe da leginda materialo.
Jen elekto:

1. **Principaj pripacaj artikoloj**
— De kie venas minaco kontraŭ paco?
— La mito de sendanĝera milito
— USONO strebas al mondregado
— Dresdeno — monumento kontraŭ milito
2. **Mondproblemoj**
— Nova internacia informada ordo — celoj, principoj kaj vojoj
3. **Beletro**
— La ordono (M. Arnold)
— La keglejo (Wolfgang Buchert)
— Poemoj de Wilhelm Busch, B. Brecht, J. W. Goethe, Herbert Dorbe, E. Weinert
— Eseo de Karl Schulze pri sia Faŭst-traduko
4. **Materialoj pri Georgi Dimitrov (Asen Grigorov, Nikola Aleksiev)**
5. **Fakaj artikoloj**
— Pri la transitiveco de verboj (Golden)
— Esploroj pri sociaj aspektoj de Esperanto kaj ĝia parolantaro (Blanke)
— La planlingva ideo kaj la scienc-fikcia literaturo en GDR (Lennartz)
— Zamenhof pri la interna ideo de la esperantismo (Murgin)

kaj krome recenzoj kaj koresponddeziroj.
La kajeroj haveblas ĉe GDREA kaj kostas 1,— markon.

Friedenstreffen in Riesa

In Vorbereitung des X. Bundeskongresses fanden im Juni 1982 in Riesa die „Tage des Kulturbundes“ unter dem Thema „Arbeiterklasse — Kunst — Kulturbund“ statt. Auf dieses Ereignis wies die Kreisgruppe des Esperanto-Verbandes in ihren Schaukästen hin. Nach Absprache mit der Kreisleitung des Kulturbundes, der Bezirksleitung des Kulturbundes und der SED-Ortsleitung führten wir am 9. 6. 1982 im Klub der Intelligenz „Hans Grundig“ das öffentliche Forum durch, welches unter dem Thema „Unser Wort — unsere Tat für den Frieden“ stand und das Anliegen der Mitglieder des Kreisvorstandes Esperanto, der BAG Philatelie und der AG Philatelie Riesa klar herausstellte. Dieses Forum sollte das Ergebnis der seit September 1981 bestehenden interdisziplinären Zusammenarbeit dieser Verbände darstellen.
Unserer Einladung waren 72 Interessenten gefolgt. Die musikalische Umrahmung nahmen Schüler der Riesaer Musikschule vor. Unter den Anwesenden konnten wir Prof. Paul Michaelis, Dresden, Dr. Günter Minkwitz, Dresden, Rainer Arnold, SED-Bezirksleitung Dresden (Abt. Kultur), Adalbert Speer, SED-Kreisleitung Riesa, Max Hübner, Volkskammerabgeordneter, Riesa, Eva Focke, Mitglied des Friedensrates der DDR, Riesa, und andere Persönlichkeiten begrüßen.
Da die Vorsitzenden der BAG und AG Philatelie an der Teilnahme verhindert waren, berichtete ich über die Tätigkeit der Esperantisten der DDR, ihr Grundanliegen, ihre Ziele, geplante internationale Treffen, u. a. auch über die Tatsache, daß bei den Mitgliedern auch die aktive antiimperialistische Solidarität nicht vergessen wird. Als Ergebnis des Wettbewerbsprogramms konnten 95 M Solidaritätsspende übergeben werden.
In der von den Anwesenden einstimmig angenommenen Willenserklärung wurde auch die Aggression Israels im Libanon verurteilt.

Margot Seeger, Vorsitzende des Kreisverbandes
Esperanto im KB der DDR Riesa

Junulara Esperanto-Lernejo (JEL '82)

Unuan fojon okazis en Bardejov (Ĉeĥoslovakio) Junulara Esperanto-Lernejo en la tempo de 4a ĝis 17a de julio 1982. Ĉi tiuj du semajnoj enhavis ĉiutagan novan programon precipe por gejunuloj.
Oni gvidis la ĉiutagan instruadon (krom sabate kaj dimanĉe) en tri etapoj. Krome la partoprenintoj povis pasigi multajn interesajn tagojn kun riĉa programo kiel: magia vespero, karnevalo, „Samtero“ — pantomima teatraĵo (unuan fojon prezentita en JEL '82), bivakfajroj kun prezentado de programoj, dancvesperoj kun vendado de esperantaĵoj, ekskursoj kaj migradoj al montopintoj, muzeoj kaj al la konata kuracloko „Bardejovské Kŭpele“ k. a.
Ankaŭ ekzistis la ebleco naĝi kaj bani en proksima banejo aŭ en termala akvo.
Ĉiuj partoprenintoj, kiuj trapasis la ekzamenon, ricevis diplomon. Kaj je la fino okazis granda adiaŭo- kaj baptofesto, dum kiu oni amuze baptis ĉiujn komencantojn.
JEL '82 tre plaĉis al ĉiuj kaj mi nur povas rekomendi ĝin por la sekva somero.

Birgit Knoll

GDREA informas

4-a plenkunsido de CE de GDREA

En Frankfurt/O. okazis la 29./30. oktobro 1982 la 4a plenkunsido de la Centra Estraro de GDREA. Sur la tagordo estis la priparolo de la rezultoj de la 10a Kongreso de Kulturligo, problemoj de la junulara agado, laborplano de GDREA por 1983, diversaj raportoj kaj unua diskuto pri la partopreno de GDREA-anoj en la 68a Universala Kongreso de Esperanto 1983 en Budapest.
Estis refondita la Junulara Komisiono, al kies estraro nun apartenas krom Michael Lennartz (prezidanto) ankaŭ Rolf Janke, Carola Böse, Sabina Klemenziak, Andreas Penk kaj Elke Valtin. Dum la kunsido partatempe laboris du komisionoj: a) faka agado kaj b) distrikta agado, dum kiuj oni pridiskutis la planojn de la fakgrupoj kaj de la distriktaj estraroj de GDREA.
Laŭdinda preparo flanke de la distrikta estraro de GDREA en Frankfurt/Oder kunhelpis la sukceson de la konferenco. Oni disaŭdigis radiointervjuon de la loka stacio. En la urbo grandaj afiŝtabuloj informis pri la plenkunsido.

Nova distrikta estraro en Cottbus

La 23an de oktobro 1982 en Hoyerswerda okazis kunveno de esperantistoj de la distrikto Cottbus. En ĉeesto de la sekretario de GDREA d-ro Detlev Blanke oni elektis estraron de GDREA por la distrikto Cottbus. Kiel prezidantino elektiĝis Christel Kraus.

Distrikta renkontiĝo en Berlin

Sian 12an distriktan renkontiĝon la esperantistoj de Berlin okazigis la 14an de novembro 1982. Kunvenis 60 personoj, inter ili gastoj el ČSSR kaj Pollando. Menciindas prelegoj pri aktualaj problemoj de la esperantista agado (d-ro D. Blanke), pri la pionira renkontiĝo en Wuhlheide (Fritz Wollenberg) kaj programo pri Johann Wolfgang Goethe (Wera Dehler, Hartmut Mittag, Fritz Wollenberg).

Distrikta renkontiĝo en Potsdam

70 esperantistoj kaj gastoj el Ruse (Bulgario) kaj Opole (Pollando) partoprenis la 23. 10. 1982 la distriktan renkontiĝon de Esperanto-Asocio en KL de GDR en Potsdam. Oni prezentis kulturprogramon, diskutis pri la estonta agado kaj aparte elstarigis la internacian ĉhon ricevitan je la esperantigita prospekto pri la iama koncentrejo Sachsenhausen.

Jam la 7a junulara renkontiĝo

En la distrikto Neubrandenburg oni tre kontinue kaj sisteme agadas en la junulara sfero. Jam la 7a junulara renkontiĝo okazis ĉi-jare, nome la 22an ĝis 24an de oktobro 1982. Renkontiĝis 25 junuloj, inter ili la prezidanto de la Junulara Sekcio de GDREA, Michael Lennartz.

Junulara seminario

20 junaj esperanstistoj partoprenis seminarion, kiu okazis de 29a de novembro ĝis 3a de decembro 1982 en Lychen. Ĝin gvidis Michael Lennartz. La seminario traktis problemojn de la internacia kaj GDR-a Esperanto-movado.

Intensa kurso en Dohna

De 1a ĝis 7a de novembro 1982 en Dohna (distrikto Dresden) okazis intensa kurso, kiun gvidis la ĉeha pedagogo prof. Polenský. Partoprenis 24 personoj.

16a seminario en Lychen

27 funkciuloj de la grupoj kaj estraroj de GDREA partoprenis la 16an seminarion en Lychen (7.—12. 11. 82). Prelegis Werner Pfennig, Hans-Joachim Borgwardt kaj d-roj T. Dahlenburg kaj D. Blanke.

Honorinsigno

La Honorinsignon de la Centra Estraro de GDREA ricevis Lieselotte Habicht el Waltershausen dum la tridistrikta renkontiĝo (Erfurt, Gera, Suhl), la 5an de septembro 1982 en Gotha.

Ni kore gratulas

Ni kore gratulas
- al Otto Möller el Heiligenstadt, kiu festis la 18an de novembro 1982 sian 75an naskiĝtagon,
- al Rudolf Masek el Neudietendorf, kiu festis la 12an de novembro 1982 sian 80an naskiĝtagon.
- al la membro de la Centra Estraro de GDREA, Ingrid Erfurth el Jena, kiu la 18an de junio 1982 promociis al filologia doktoro (literaturscienco).

Ni funebras

- pri Alois Jauernig el Sangerhausen, kiu forpasis en aĝo de 83 jaroj la 31an de julio 1982. Li estis aktiva esperantisto, kiu aparte agadis sukcese en Quedlinburg,
- pri Supera Studkonsilisto k-do Fritz Hagemann el Raschau, kiu mortis la 17an de septembro 1982 en aĝo de 82 jaroj. Li agadis tre aktive en Raschau kaj Schwarzenberg.

Björn Collinder, Vilho Setälä:
Popolaj Fabloj el Finnlando
KYRIIRO OY
Finnlando, Novjaro 1979

Kamuflite sub supra titolo de malgranda kajero reklamiĝas la interŝanĝo de la esperantistaj supersignoj literoj jene:

ŝ	ĉ	ĵ	ĝ	ŭ	ĥ
sh	ch	zh	dzh	w	x

Efektive, ne estas silvestra sherco, sendzhene oni tuj povis dzhui la fablojn. Kia dzhusta dzhojo[1]) pri la dzhirej el la dzhangalo de supersignoj! Granda dzhibo de E-o foridzhas kaj nun E-o ekdzhermegos kaj disvastidzhos. La „politikaj awtoritatuloj" dzhentile dankos kaj chirkawbrakos la dzhermantajn E-istojn. Kaj dzhis la jaro 1987a ni arandzhos dzheneralan feston ne nur pro la 100a datreveno sed ankaw pro la finvenko de E-o. Memkompreneble kun dzhimkano kaj festa mandzhado kun burdzhonbrasiko, fromadzho, orandzhazho, rudzha vino kaj dzhino.

Stop! Jen oni ekmemoros, ke mi sammaniere povis tre bone legi literaturon laŭ Zamenhof-a „Surogata"[2]) ortografio kaj ankaŭ la tekstojn laŭ alia propono, en kiu la supersignaj literoj anstataŭiĝas per la literoj c, w, r, y de la internacia telegrafa alfabeto:

q	tq	y	dy	w	x
ŝ	ĉ	ĵ	ĝ	ŭ	ĥ

Ĉar la literoj ĉ = tŝ kaj ĝ = dĵ respektive du sonojn reprezentas, ŝajnas, ke ĉi-lasta propono prezentis teknikan solvon de la problemo.

Rilate al supersignoj fantomas la reformomanio jam tra naŭ jardekoj. Signo estas simbolo por determinita afero. Tiukaze unu litero estas — aŭ almenaŭ devas esti — la simbolo por unu difinita sono. La menciita „teknika solvo" estas valora ne nur nuntempe por la telegrafio ĉe la poŝto, navigado, aviado k. t. p., sed estas speciale grava por la projektado de elektronaj skribmaŝinoj, kiuj aŭtomate transformas la parolon al skribo. La „intestoj" de tiaj maŝinoj estas plej nekomplikaj, se la kondiĉo unu litero = unu sono" strikte estas plenumita. La sama validas ankaŭ por elektronaj komputiloj.

Sed singardo! En la unua jardeko de nia jarcento la tre riĉa franco Javal (pr. ĵaval) proponis al Zamenhof kvaronan milionon da frankoj, se Zamenhof pledos kaj realigos almenaŭ la prononcon de la litero j al ĵ. Imagu malriĉan Zamenhof-on kaj la tenton per la loga sumo de 250 000 or-frankoj — tiutempe.

— aha —

1) ĝirejo — Kurve (Straße)
2) rilatas al la h-anstataŭrigo de la supersignoj

R. Eichholz: „Ni stenografas laŭ la Germana Unueca Stenografio, Kurso de Wilhelm kaj Hans Wingen", Esperanto Press Bailieboro, Ontario, Kanada 1980, 40 paĝoj, Format: 16 × 12 cm

Wie der Verfasser im Vorwort schreibt, hat er als Student die Deutsche Einheitskurzschrift im Selbststudium erlernt und sich 1951 vertraut gemacht mit der von W. und H. Wingen geschaffenen Anpassung der Einheitskurzschrift an das Esperanto. Die Anpassung erschien damals als Steno-Kurs mit 6 Lektionen in der Monatszeitschrift „Esperanto Post" von November 1950 bis Mai 1951. Diese 6 Lektionen werden in der handlichen Broschüre mit dem deutschen Text nachgedruckt und von dem Verfasser in Esperanto-Sprache ergänzt durch ein Vorwort, durch Erklärungen und Tabellen sowie durch die Übersetzung einiger Bestimmungen der Deutschen Einheitskurzschrift, die für die Anpassung Gültigkeit haben. Damit soll jungen Esperantisten, auch Nicht-Deutschen, die Möglichkeit gegeben werden, sich das Wingen'sche System anzueignen, selbst wenn ihnen die Deutsche Einheitskurzschrift nicht bekannt ist. Der Verfasser wünscht dazu allen Lernenden das gleiche Vergnügen, das ihm selbst das Studium der Stenografie bereitet hat.

R. Eichholz ist 1953 nach Kanada ausgewandert. Seitdem hat die Deutsche Stenografie einige Veränderungen erfahren. In der DDR wurde durch die Reform von 1970 eine Schriftform eingeführt, die eine Neufassung aller früheren fremdsprachlichen Anpassungen erforderlich machte. Die neue Anpassung für Esperanto ist 1979 als Sonderdruck erschienen, siehe Hinweis im „d. e." Nr. 2/81 S. 38. In der BRD und in Österreich war bereits 1968 eine Stenografiereform vorausgegangen, die aber von der früheren Schriftform nicht wesentlich abweicht, wenigstens nicht in der Unterstufe des Systems. Die Wingen'sche Anpassung ist daher insoweit noch von Bedeutung.

Wenn auch die Arbeit von R. Eichholz auf stenografischem Gebiet nichts Neues bringt, so verdient doch die gute Absicht des Verfassers Dank und Anerkennung.

Otto Möller

★

Nova sovetia eldonajo

Aperis 44-paĝa broŝureto kompilita el la artikoloj, aperintaj en la anglalingva bulteno de la Uzbeka Amikeca Asocio kun titolo „Soviet Uzbekistan", 1980. La broŝuron preparis por la eldono S. G. Bassin, E. S. Prevertajlo kaj I. F. BORISOVA.

La eldonaĵo celas informi pri la vivo de Uzbekistano, pri atingoj kaj sukcesoj de la orienta respubliko en la konstruado de komunisma socio, pri disvolvo de ĝia ekonomio kaj kulturo, pri amikecaj interligoj de la uzbeka popolo kun ĉiuj popoloj de la terglobo kaj pri E-movado en la respubliko.

Esperanto-Komisiono, str. Ahunbabajeva 1, SU-700000 TAŠKENTO, Uzbekio, Sovetunio.

Petu la broŝurojn ĉe jenaj adresoj:
Esperanto-Klubo, ab/k 140 Poĉtamt, SU-700000 TAŠKENTO, Uzbekio, Sovetunio.

GDR

Kulturdomo en mezgr. urbo 100 km norde de Berlin serĉas kontaktojn k similaj kulturdomoj en soc. landoj por spertinterŝanĝo inter multspecaj interesgrupoj, E-grupo servas kiel peranto. Bv. skribi al: Dieter Winzer, **DDR-2130 Prenzlau,** Kreiskulturhaus, Grabowstr. 6

Komencantoj, gestudentoj dez. kor. tutmonde, kol. pm:

— Svend Austermühle, **6303 Elgersburg,** Hirtenweg 3 (20j.)
— Ute Hempel, **6300 Ilmenau,** Max-Planck-Ring 2, H. 102 (20j.)
— Simone Kienast, **6325 Ilmenau,** Prof. Stamm-Str. (23j.)
— Michael Pfaff, **6303 Elgersburg,** Hirtenweg 3 (20j.)
— Frank Piller, **6303 Elgersburg,** Hirtenweg 3 (19j.)

Manfred Teubner, **2830 Boizenburg,** Paul Czellnik-Str. 4, 26j., ŝipkonstruisto dez. kor. k gejunuloj tutmonde pri turismo, literaturo, historio, ŝipkonstruado

14-jaraj geknaboj dez. kor.:

— Anke Tietz, **1950 Neuruppin,** Frank-Künstler-Str. 14
— Veronika Rapsch, **1950 Neuruppin,** Friedrich-Engels-Str. 13
— Uta Marienfeld, **1950 Neuruppin,** Kommissionsstr. 15
— Kaspar Domke, **1950 Neuruppin,** Rudolf-Breitscheid-Str. 38

Komecanto, 18j., dez. kor. tutmonde p. ĉ. t.: Jörg Reinholz, **6902 Jena-Lobeda,** Werner-Seelenbinder-Str. 22

Dez. kor. tutmonde:

— Doris Würzberger, **1200 Frankfurt/O.,** Thomas-Müntzer-Hof 9
— Monika Schulz, **1200 Frankfurt/O.,** Georgi-Dimitroff-Allee 12
— Marion Schulze, **1200 Frankfurt/O.,** Seelower Kehre 23
— Bärbel Kulisch, **1200 Frankfurt/O.,** Langer Grund 46

Geesperantistoj el Halle dez. kor. tutmonde, skribu al: Renate Levin, **4020 Halle,** Str. d. Zukunft 16

Dancisto, 22j. dez. kor. spec. k azianoj kaj araboj pri folkloraj dancoj kaj muziko, ŝako: Detlef K. Mainz, **7050 Leipzig,** Augustenstr. 10

Komencantoj 20—45j. dez. kor. Bv. skribi al: Sabine Fiedler, **7050 Leipzig,** Riesaer Str. 53

Novfondita Altenburga E-klubo „Malnovkastelo" dez. kor. tutmonde pri paco, progresema muziko, kol. pacafiŝojn, progresajn diskojn. Skribu al: Hans-Georg Kaiser, **7400 Altenburg,** Wenzelstr. 12

Handikapitaj esperantistoj kiuj interesiĝas pri korespondkontaktoj skribu al s-ino Jutta Lorenz, **DDR-9580-Zwickau,** Kirowstraße 21

Muzikisto, instruisto por klarneto, serĉ. koresp. kun aliaj muzikistoj. Christian Voigt, **DDR-7700-Hoyerswerda,** Virchowstraße 60

Belgio

Belga civitano ŝatus kontakti korespondemulojn el GDR, pref. ĉ. 26j., edzinigîntajn kaj evt. interesitajn al plipostaj reciprokaj kontaktoj: Jean-Pierre Allewaert, **8710 Heule,** Kortrijksestraat 76

ČSSR

Inĝ. Jan Lauŝ, **61300 Brno,** Merhautova 13/3, (36j.), dez. kor. tutmonde p. ĉ. t., kol. bk, esperantaĵojn

Studento, 20j., ĝez. kor. tutmonde p. ĉ. t., kol. bk k turismajn prospektojn: Libor Krejĉi, Arbesova 875, **396 01 Humpolec**

Tri amikinoj, 13—15j., dez. kor. tutmonde p. ĉ. t., komuna adreso: Lenka Masarîková, Kociánov 77, **788 11 Loučná n/D. 1.,** okres Šumperk

Kubo

Juna profesoro de angla lingvo dez. kor. tutmonde, kol. diapozitivojn, modrevuojn, gramofondiskojn, aktorfotojn: Carlos N. Alvarez Molina, Avenida 85, n-ro 10005, **Günies,** Prov. Habana

Verkisto, pentristo, skulptisto, 28j., dez. kor. tutmonde pri poezio, teatro, pentroarto, junulara muziko, literaturo, kol. bk: Jose L. Naranjo, Ave. 47 n-ro 7428 e/74 y 80, **San José de las Lajas.** La Habana

Herausgeber: Kulturbund der DDR
Esperanto-Verband
Redaktion: 1080 Berlin, Charlottenstr. 60
Fernruf: 2 20 29 91
Verantw. Redakteur: Dr. Detlev Blanke.
Redaktionskommission: Hans Heinel, Werner Pfennig, Rudolf Hahlbohm, Ludwig Schödl. – Veröffentlicht unter der Lizenz-Nr. 648 des Presseamtes beim Vorsitzenden des Ministerrates der DDR. – Erscheinungsweise: 6mal im Jahr. Preis pro Einzelheft 30 Pf.
Druck: Druckwerkstätte Glauchau
Artikel-Nr. (EDV) 7928 III-12-8 46